



EL POPOLA ĈINIO

Kamarado Maŭ Zedong estas la plej granda marksist-leninisto en la nuna epoko. Kamarado Maŭ Zedong genie, kreive kaj plenam-plekse heredis, defendis kaj disvolvis marksism-leninismon, kaj levis ĝin al tute nova stadio. La penso de Maŭ Zedong estas marksism-leninismo de la epoko, en kiu imperiismo iras al kompleta disfalo, dum socialismo iras al venko en la tuta mondo. La penso de Maŭ Zedong estas la gvid-principo de ĉiuj laboroj de nia tuta partio kaj nia tuta lando.

— El la Komunikado de la Dekunua Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio




Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ en la Plivastigita Dekdua Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio.



Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko Vicprezidanto Lin Biaŭ kunestas kun reprezentantoj de la propagandaj taĉmentoj de la penso de Maŭ Zedong en la ĉefurbo.





Tenu Revolucion, Stimulu Produktadon kaj Batalakiru Novajn Venkojn sur la Industria Fronto

Ĉefartikolo de *Renmin Ribao*

LA granda proletara kultura revolucio, kun ekstreme potenca forto, impulsas la socialisman konstruadon de nia lando al rapida disvolviĝo. La rapida disvastigo de la penso de Maŭ Zedong inter la cent-milionoj da popoloj kaj la penetra disvolviĝo de la revolucia amasa movado por batalo, kritiko kaj reformo akcelas la senprecedencan altiĝon de la aktiveco de la vastaj popolamasoj en revolucio kaj produktado. En la agrikultura produktado, nia lando akiris riĉrikoltojn dum pluraj sinsekvaj jaroj. Kune kun la novaj venkoj en la granda proletara kultura revolucio, laŭplana kaj laŭpaŝa nova disvolviĝo de in-

dustria produktado jam estiĝis en multaj gravaj urboj kaj regionoj. Ĝia alveno estas pli rapida ol atendite, kaj ĝia bazo estas pli profunda ol iam ajn antaŭe. Multaj fabrikoj, minejoj kaj aliaj entreprenoj kontinue renovigis siajn produktajn rekordojn, superintesian plej altan produkt-nivelon en la historio. La laborista klaso sukcese konkeris multajn gravajn teknikajn objektojn, kiujn ne povis sukcesigi burĝaraj reakciaj teknikaj aŭtoritatuloj dum longa tempo. La antaŭnelonga sukcesa eksplodigo de alia hidrogen-bombo markis novan antaŭensalton de la industria produktado, scienco kaj tekniko de nia lando.

La Nankina Jangzi-rivera Pontego projektita kaj konstruita de nia lando mem jam antaŭdate plene malfermiĝis al trafiko. La petrola industrio antaŭdate plenumis sian taskon difinitan de la Tria Kvinjara Plano. La totala produkt-valoro de industrio en la dua duono de 1968 grandmezure pliiĝis kompare kun tiu en la unua duono de la sama jaro. La teknika revolucio estas disvolviĝanta, kaj senĉese aperas novaj produktaĵoj, novaj teknologioj kaj novaj materialoj. La tuta industria fronto estas en plena vigleco, ĝiaj venkaj informoj sin sekvas unu post alia kaj ĉie regas entuziasmo kaj prospero.

La bonega situacio sur la industria kaj agrikultura frontoj alportas bonegan situacion sur la financa kaj komerca frontoj. La prezoj estas stabilaj kaj la merkato estas prospera. Ĝis la fino de 1968, la enlandaj obligacioj jam estas tute amortizitaj, kaj nia lando jam fariĝis potenca sendependa socialisma lando libera de enlanda kaj eksterlanda ŝuldoj en la mondo.

Tio ĉi estas granda venko de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, granda venko de la granda proletara kultura revolucio, kaj brila frukto de la granda orientilo de Prezidanto Maŭ **“tenu la revolucion kaj stimulu la produkton, aliajn laborojn kaj pretecon kontraŭ milito.”**

En 1969, ni devas plue efektiviĝi la orientilon **“tenu la revolucion kaj stimulu la produkton”**, aktive gvidi la grandan amasan movadon sur la industria fronto, konduki la grandan proletaran kulturalan revolucion ĝis la fino kaj batalakiri ankoraŭ pli grandajn venkojn en revolucio kaj produkto.

La rilato inter revolucio kaj produkto ĉiam estas tiu inter komandanto kaj komandato. La bonega situacio de produkto rezultis el la bonega situacio de revolucio. Ni devas meti revolucion en komandon, kaj per ĝi konduki kaj stimuli produkton. En **“tenado de la revolucio kaj stimulado de la produkto”**, unue ni devas teni revolucion, konduki

klasan batalon, fari mobilizon de la amasoj kaj plene realigi diversajn politikojn.

Prezidanto Maŭ montris lastatempe: **“En la stadio de batalo, kritiko kaj reformo de la granda proletara kultura revolucio, la politikoj devas esti serioze atentataj.”** Ĉiuj fabrikoj, vilaĝoj, lernejoj kaj registaraj institucioj devas serioze efektiviĝi ĉi tiun plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ.

Sekvante la proletaran revolucian linion de Prezidanto Maŭ, ni devas daŭre solidigi kaj disvolvi la revolucian grandan unuiĝon laŭ organizaj sistemoj kaj profesioj, kaj solidigi kaj perfektigi la revolucian triflankan kombiniĝon. Ni devas profunde konduki la amasan revolucian kritik-refuton kontraŭ ĉiuj reakciaj reviziismaj teorioj sur la ekonomia fronto disvastigitaj de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Saŭki kaj la plenumo da aliaj plej grandaj enpartiaj potencentantoj irantaj la kapitalisman vojon, kaj elimini la venenan influon de la kontraŭ-revolucia reviziisma linio de Liu Saŭki. En tiuj unuoj, kiuj ankoraŭ ne finis la taskon de purigo de la klasa vicaro, oni devas firme teni tiun ĉi laboron, efektiviĝi ĉiujn proletarajn politikojn difinitajn de Prezidanto Maŭ, unuiĝi kun la vastaj amasoj, diferencigi la du specojn de kontraŭdiroj kun malsamaj naturoj, **plivastigi la amplekson de edukado kaj redukti tiun de atakado**, kaj malkaŝi plenumon da kontraŭrevoluciuloj, kiuj provas fari antaŭmortan barakton, subfosi la socialisman produktadon kaj la grandan kulturalan revolucion kaj instigi amasojn al interbatalo. En tiuj unuoj, kiuj jam fundamente plenumis la taskon de purigo de la klasa vicaro, oni devas senprokraste plenumi aliajn taskojn de batalo, kritiko kaj reformo, inkluzive la reordigon kaj konstruadon de la Partio, kaj tiel kontinue puŝi antaŭen la ardan revolucian amasan movadon. Kamaradoj laborantaj en la revoluciaj komitatoj devas memori la instruon de Prezidanto Maŭ **“zorgu la vivon de la amasoj, priatentu metodojn de laboro”**, modeste lerni de la amasoj kaj fari profundan, zorgeman ideologian kaj politikan laboron inter la amasoj.

En la batalo por plenumi taskojn de ĉiu stadio en batalo, kritiko kaj reformo, la gvidantaj kamaradoj de diversaj niveloj devas bone fari enketon kaj esploron, analizi la staton en plena amplekso kaj lerte kapti tipojn, inkluzive la du flankojn: ĝustatempe resumi progresintajn spertojn en batalo, kritiko kaj reformo kaj fari decidojn solvi problemojn longdaŭrajn, gravajn kaj malfacilajn en nemultaj unuoj. Kaj samtempe ili devas atente trovi, esplori kaj diskrete trakti la ĵus aperintajn problemojn kun politika karaktero, kaj teni laboron pli profunde, pli firme kaj pli solide. Nur bone teni la revolucion kaj firme efektivigi ĉiujn proletarajn politikojn ebligas ke la gvidanteco estu firme tenata en la manoj de la proletaro, kaj la aktiveco kaj kreivo de la laborista klaso kaj la vastaj amasoj estu plene disvolvataj.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“La laborista klaso nepre devas gvidi ĉion.”** **“Fidu al la amasoj, sin apogu sur ili kaj respektu ilian iniciativon.”** En la laboroj en urboj, **“ni nepre devas tutkore kaj tutanime nin apogi sur la laborista klaso, unuiĝi kun la aliaj laborantaj amasoj kaj gajni al ni la intelektulojn.”** Tio estas fundamenta linio elmetita de Prezidanto Maŭ jam en lia raporto al la dua plena sesio de la sepa centra komitato de la Partio. Tiu linio manifestis sian grandan revolucionan potencon en la granda proletara kultura revolucio. La revolucia aktiveco kaj kreivo de la laborista klaso kaj la vastaj popolamasoj estas neelĉerpeblaj; ni devas plene taksi la gigantan kreivan forton de la laborista klaso armita per la penso de Maŭ Zedong. Prezidanto Maŭ profunde montris: **“Ĉe la amasoj latentas treege granda socialisma entuziasmo.”** Nia devo estas kontinue disvolvi kaj organizi tiun socialisman entuziasmon de la amasoj. Inter la vastaj laboristaj amasoj ni devas kontinue disvolvi amasan movadon por kreive studi kaj kreive apliki la penson de Maŭ Zedong, elstarigi la proletaran politikon, altigi la politikan konscion de la laborista klaso, kritik-refuti kaj venki la influon de la burĝara ideologio al laboristoj kaj akceli

la ideologian revoluciigon de homoj. Ni devas organizi inĝenierajn kaj teknikajn personojn partopreni produktan laboron, por ke ili akceptu redukon de la laborista klaso kaj sin kombinu kun saĝo de laboristaj amasoj, kaj tiamaniere la triflanka kombiniĝo de laboristoj, teknikistoj kaj gvidantaj kadroj bone ludu sian rolon. La neraciaj reguloj kaj sistemoj devas esti reformitaj post diskutado de la amasoj kaj ekzemplodona provado.

Ni nepre devas serioze studi la serion da fundamentaj gvidaj ideoj de Prezidanto Maŭ pri la socialisma konstruado kaj kombini ilin kun la specifaj kondiĉoj en ĉiu departemento kaj unuo. Ni devas kompreni la orientilon de Prezidanto Maŭ **“tenu la revolucion kaj stimulu la produkton, aliajn laborojn kaj pretecon kontraŭ milito”** el la alteco de lia granda strategia penso **“sin prepari al eventuala milito, sin prepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj servi al la popolo”**. En organizado de socialisma produkto, ni devas konsideri problemojn el tio, ke en nia lando estas sepcent milionoj da loĝantoj, el la ĝenerala orientilo por la disvolvo de la nacia ekonomio, tio estas, **“preni agrikulturon kiel la bazon kaj industrion kiel la gvidan faktoron”**, el la neceso por energia plifortigo de la nacia defendo kaj sinpreparo kontraŭ naturaj katastrofoj, el la tasko de servo al la vasta laboranta popolo de Ĉinio kaj subteno kaj helpo al la mondaj revoluciaj popoloj. Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“Sur kian bazon ni metu nian politikon? Metu ĝin sur la bazon de niaj propraj fortoj, nome: sinapogo sur la propraj fortoj.”** Prezidanto Maŭ montras plue: **“El ĉiuj aferoj en la mondo, homo estas la plej valora. Sub la gvido de la Komunista Partio, se nur estas homo, ĉiaj mirakloj povas esti kreitaj.”** Nia baza strategia orientilo estas stari firme sur la bazo de apogo sur niaj propraj fortoj, plene elvolvi la fortojn de la popolamasoj kaj **organizi la fortojn de amasoj**. Se nur ni agos laŭ tiu orientilo, ni povos plene mobilizi la grandan forton de la sepcent-miliona ĉina popolo kaj por ĉiam restos nevenkeblaj. Liu Ŝaŭki kaj la

plenmano da aliaj plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon distrumpetis serion da kontraŭrevoluciaj reviziismaj absurdaj asertoj kiaj la sklava filozofio pri dependo de fremduloj en ĉio, “administrado de fabriko per specialistoj”, “metu profesiajn laborojn en la unuan lokon”, “metu profiton en komandon” kaj “materia stimulo”. La centra punkto de tiuj absurdaĵoj estas nei la forton de la popolamasoj, subpremi la revoluciajn amasojn, vane intenci restaŭri kapitalismon, vendi Ĉinion kaj turni Ĉinion en kolonion de imperiismo kaj reviziismo. Tiu ĉi intrigo jam estas frakasita de la fera pugno de la granda proletara kultura revolucio.

Ni devas, sub tutlanda unueca projekto, elvolvi plene la aktivecon kaj kreivon de la amasoj kaj la iniciativon de la lokoj. Ni devas garantii altkvalite plenumi la taskon de eldono de verkoj de Prezidanto Maŭ. Estas necese efektiviĝi kaj plenumi la orientilon konstrui nian landon diligente kaj ŝpareme, mastrumi la entreprenojn diligente kaj ŝpareme, **ŝpari en fardo de revolucio** kaj decideme oponi malŝparemon. Estas necese energie disvolvi minekspluatatan industrion, plifortigi la subtenon kaj helpon de industrio al agrikulturo, plifortigi la komunikan kaj transportan fronton. La orientilo “iri per du gamboj” devas esti efektivigata kaj plenumata. Samtempe kun la garantio plenumi ĉiujn taskojn en la fundamenta konstruado de la ŝtato, estas necese plene ekspluati la latentan forton de la ekzistantaj entreprenoj por levi la nivelon de memsufiĉeco en industrio. Estas necese pluapaŝe disvolvi la movadon de teknika revolucio, elvolvi la saĝon de la amasoj, sturmi la pintojn de la scienco kaj tekniko, disvolvi sintezan uzon de materialoj kaj lukti por **“atingi kaj superi avangardan mondan nivelon”** en des pli multaj kampoj.

Lastatempe Prezidanto Maŭ montris: **“Farante planon oni nepre devas mobilizi la amasojn kaj priatenti rezervi sufiĉe da interspaco.”** Tio estas konstanta instruo de Prezidanto Maŭ. Ni devas plene disvolvi la aktivecon de la amasoj kaj samtempe prizorgi

la aktivecon de la amasoj. Estas necese elmontri realan staton al la amasoj, mobilizi ilin por diskuti la planojn kaj taskojn, trovi la ŝlosilajn punktojn kaj elpensi rimedojn; kaj samtempe, estas necese rezervi sufiĉe da interspaco por ke la vastaj amasoj povu atingi aŭ superi la novajn produktajn normojn post sia aktiva penado kaj tiel la amasa movado povu konstante disvolviĝi antaŭen kaj alten ondon post ondo.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“Ĉinio fariĝos potenca socialisma industria lando. Ĉinio devas esti tia. Ĉar ĝi estas lando kun areo de 9,600,000 kvadratkilometroj kaj loĝantaro de 600 milionoj da homoj, kaj ĝi devas fari pli grandan kontribuon al la homaro.”**

La ĉina laborista klaso, hardita en la granda proletara kultura revolucio de pli ol du jaroj, ege altigis sian konscion de klasa batalo kaj batalo inter la du linioj kaj fariĝis plena je vigleco kaj batalvolo. La laborista klaso kaj la vastaj revoluciaj amasoj, senlime fidelaj al Prezidanto Maŭ, al la penso de Maŭ Zedong kaj al la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, nun plene disvolvas siajn saĝon kaj kreivon por surgrimpi altajn pintojn de scienco kaj tekniko en la mondo. Nia socialisma patrolando floras kaj prosperiĝas tagon post tago, dum la usona imperiismo, sovetunia reviziismo kaj ĉiuj reakciuloj en la mondo putras kaj sin trovas en vespera krepusko kaj senelira situacio. La situacio estas ĝuste tia: **Aparte ravas la pejzaĝo ĉi tie.** En tiu bonega situacio, ni devas plue disvolvi la heroan spiriton de la proletaro kaj antaŭenmarŝi kun pli alta vigleco!

Ni strikte unuiĝu ĉirkaŭ la proletara komandejo kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto Lin Biaŭ kiel la vicestro, streĉu plene la energion kaj strebu forte antaŭen, mobilizu ĉiujn aktivajn faktorojn, kaj pli multe, rapide, bone kaj ekonomie akcelu la disvolviĝon de diversaj socialismaj aferoj por bonvenigi la Naŭan Tutlandan Kongreson de la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio per novaj sukcesoj en revolucio kaj produktado!

Giganta Frukto

de Sinapogo

sur Propraj Fortoj

Sur la Nordĉinia Ebenejo staras modernaj industriaj urboj nove aperintaj post la Liberiĝo. Tra la batala bapto de la granda proletara kultura revolucio, venas de tie sonoraj triumfaj kantoj unu post alia. La Hebej-a Nitrosterka Fabriko jam venke finis la lastan stadion de sia konstruado kaj nun ekfunkciis oficiale. Ĝi estas projektita, kreita kaj instalita de la ĉina laborista klaso mem, kun la monda progresinta nivelo en la sesdekaj jaroj dank' al disvolvado de la proletara revolucia spirito sinapogi sur propraj fortoj.

Antaŭnelonge ni faris mallongan viziton al la nitrosterka fabriko. Tie ĉio okazinta elokvente pravas, ke la laborista klaso de Ĉinio, armita per la

penso de Maŭ Zedong, povas krei ĉian ajn miraklon en la mondo.

I


Kiam la blankaj ureaj grajnoj falis de la supro de la grajniga turo alta je dekoj da metroj, tuj ekbolis la tuta fabriko. Kun ruĝa koro kaj ridanta vizaĝo, la laboristoj tenis la ruĝan trezoran libreton en la mano kaj foje-refoje ĝojkriis: "Vivu Prezidanto Maŭ!", "Vivu la venko de la konstrua orientilo de Prezidanto Maŭ pri sinapogo sur propraj fortoj!"

La aerskuaj fajrajkrakado, tamtamado kaj tamburado kaj varmaj ĝojkrioj portis nin en la

rememoron pri triumfo: Jam frue en 1945 nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ antaŭvide montris: “Sur kian bazon ni metu nian politikon? Metu ĝin sur la bazon de niaj propraj fortoj, nome: ‘sinapogo sur propraj fortoj.’” En la periodo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando, Prezidanto Maŭ denove montris: “Ni ne devas iri la malnovan vojon de aliaj landoj de la mondo en disvolvo de tekniko kaj rampadi

paŝen post paŝo post la aliaj. Ni nepre devas rompi la rutinojn kaj plejeble apliki progresintajn teknikojn por konstrui nian landon en modernan socialisman potencan landon en ne tro longa historia periodo.” Kiel lumturo la instruoj de Prezidanto Maŭ prilumas la vojon por efektivigo de la industria modernigo de nia lando. La finkonstruo kaj ekfunkciado de la Hebej-a Nitrosterka Fabriko — moderna entrepreno kun monda progresinta nivelo — refoje

Angulo de la nitrosterka fabriko




manifestis, ke senkompare saĝa kaj ĝusta estas la konstrua orientilo de Prezidanto Maŭ pri sinapogo sur propraj fortoj.


La novtipaj kataliziloj, novaj precizaj instrumentoj kaj novaj ekipaĵoj antaŭ la okuloj de la vizitantoj ĉiuj estas kreitaj de la laborista klaso, revoluciaj inĝenier-teknikaj laborantoj kaj revoluciaj kadroj en la triflanka kombiniĝo. Precipe la sukcesa esploro kaj fabrikado de novtipaj kataliziloj, la solvo de la problemo de obstrukco kaŭzita de sulfuro kaj la sukcesa finkonstruo de la laborejo de la akvosolvaĵa tutcikla ureo respektive superis la nivelojn de la tiel nomataj progresintaj kapitalismaj landoj en Okcidento; la sukcesa fino de la laststadia konstruo kaj la alta rapideco de ekfunkcio de la nitrosterka fabriko rompita la mondan rekordon en la historio de nitrosterka fabrikado. Ĉio ĉi tio kiel brila paĝo estas enskribita en la disvolvan historion de la nitrosterka industrio de nia lando. Veterana laboristo Ji Fuĉeng diris: "La sukcesa fino de la laststadia konstruo de la nitrosterka fabriko estas politika batalo kiun kondukis ni la ĉina laborista klaso armita per la penso de Maŭ Zedong kontraŭ la usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo." Tute prave! Tuj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la burĝaro en la lando dubis pri nia kapablo en konstruado, kaj ankaŭ la horoskopistoj en la okcidentaj kapitalismaj landoj estrataj de la usona imperiismo songis tian aŭ alian belan songon, opiniante ke la ĉina popolo ne povas vivteni plu sen almozpeto al la okcidentaj kapitalismaj landoj. Tamen la faktoj ĝuste iras kontraŭ la deziro de la miopaj horoskopistoj, la ĉina popolo ne nur vivas tre bone sen sinturno al la okcidentaj kapitalismaj landoj, sed ankaŭ faras sian landon prospera kaj potenca tagon post tago.

La perspektivo de la vojo de konstruo per sinapogo sur propraj fortoj estas senlime vasta, kaj la saĝo kaj kreivo de la amasoj estas neelĉerpeblaj. En la lasta stadio de konstruado kaj ekfunkciado la floroj de sinapogo sur propraj fortoj prosperis tra la tuta fabriko.

Kiel pleniga materialo en pumpilo uzata por amino-karbonacida solvaĵo laŭ la projekto devas esti aplikata altranga plasto, kies prezo estas alta kaj efiko malalta. Por solvi tiun ĉi problemon, sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ konstrui



Grajniga turo



Laborejo

nian landon diligente kaj ŝpareme, sinapogi sur propraj fortoj kaj penege lukti por prosperiĝo, la laboristoj fine sukcesis fabriki pli idealan plenigan materialon post trimonata ripetada eksperimentado. La efiko de tia materialo estas kvaroble pli granda ol tiu de la projektita altranga plasto, dum la prezo reduktiĝis al kelkdekono. Tiu ĉi renovigo faris novan kontribuon en la laststadia konstruado kaj la plibonigo de la sigelita plenigaĵo por la kemia industrio.

En la prova produktado kaj funkciado elĉerpiĝis risortoj el speciala nerustiĝa ŝtalo nove uzataj en la ekipaĵo de la urea laborejo. Se oni ne povus

solvi la mankon de la risortoj, tio certe influus la provan produktadon en la laststadia konstruado. Kion fari? La ĉinaj laboristoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong neniel povas esti timigitaj antaŭ tiuj malgrandaj malfaciloj. Kun ŝtala volo ili firme respondis: "Ni mem provu fabriki." Sub la kondiĉoj de manko de materialoj kaj spertoj la revoluciaj laboristoj, la revoluciaj inĝenier-teknikaj laborantoj kaj la revoluciaj kadroj fine sukcesis en la provfabrikado, venkinte malfacilojn unujn post aliaj. La risortoj kontrolitaj en la uzado plene konformas al la postulo de la produktado.

Ĉio ĉi tio estas la brilaj atingoj akiritaj de la laborista klaso de nia lando sub direktado de la konstrua orientilo de Prezidanto Maŭ pri sinapogo sur propraj fortoj.

II

En nova Ĉinio post la Liberiĝo ankoraŭ ekzistas intensa kaj komplika klasa batalo. Ekzistas la du pinto-kontraŭ-pintaj linioj en la periodo de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando. La proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ pri plena dependo kaj senrezerva mobilizo de la revoluciaj amasoj kaj pri sinapogo sur propraj fortoj ĉiam estis ĝenata de la reviziisma linio de "rampisma filozofio" kaj "administrado de fabrikoj per specialistoj" antaŭenpuŝita de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en diversaj kampoj. En la laststadia konstruado de la nitrosterka fabriko akre iris la batalo inter la du linioj. Apenaŭ la revolucieca projekto pri provfabrikado de tri novtipaj kataliziloj en unu jaro estis elmetita, ĝi tuj renkontis frenezan oponon de la plenmano da morte obstinaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj reakciaj teknikaj "aŭtoritatuloj" en la fabriko. Proparolanto de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon de la fabriko kaj burĝara reakcia teknika "aŭtoritatulo" kun titolo de ĉefinĝeniero elpaŝis kaj diris kapskuante: "Vi ja tro kuraĝas pensi kaj agi. Por fabriki novan specon de katalizilo la usonanoj elspezis dekkelkajn jarojn, kaj ke vi volas fabriki tri novtipajn katalizilojn en unu jaro, tio tute ne eblas." Ĉeestantaj laboristoj fingromontris tiun ĉi lakeon rekte en la vizaĝon kaj diris kun indigno: "La laststadia konstruo estas kondukata laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ pri sinapogo sur propraj fortoj, ni laborista klaso nepre batalos por akiri la

venkon." Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la fabriko neniom komprenis la veron, ke la popolo estas kreanto de la historio. Ĉio, kio plene okupas ilian cerbon, estas superstiĉo pri fremdlandoj, dependo de importoj kaj "rampisma filozofio" sekvi la vostojn de la kapitalismaj landoj de la Okcidento. Kun indulgema sinteno kaj la deziro unuiĝi kun li kaj lin remuldi, kaj el la konsidero pri la intereso de la Partio kaj popolo, ili plurfoje venis al la ĉefinĝeniero por interkonsiliĝi pri la eksperimentado de novaj kataliziloj, tamen tiu ĉi reakcia teknika "aŭtoritatulo", kiu ricevas altan salajron de la popolo, eĉ diris senskrupule: "Antaŭlonge mi jam diris, ke en unu jaro oni ne povas elfabriki." Tion dirante li forglitis. Neniel povante premi la indignan flamon en la koro, la laboristoj diris unuvoĉe: "Piedpuŝu lin for. Ni mem entreprenu." Foje-refoje studante la instruon de Prezidanto Maŭ "**Ni posedos tion, kion la fremdlandanoj havas, kaj ankaŭ tion kion la fremdlandanoj ne havas**", la laboristoj konkeris barojn post baroj kaj malfacilojn post malfaciloj en esplorado, kaj fine sukcesis elfabriki la unuan serion da produktaĵoj de la tri novtipaj kataliziloj

Kontrola ĉambro



de nia lando post senĉesa peniga lukto en daŭro de ok monatoj.

Sub helpado de la propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong de PLA en la fabriko kaj dank' al fervora funkciigo de la kursoj de la penso de Maŭ Zedong kaj konduko de amasa revolucia kritiko, la laboristoj multe altigis sian konscion pri klasa batalo kaj linia batalo. Fini laŭ la fiksita dato la laststadian konstruon, batali por gloro de la patrio kaj labori por la revolucio jam fariĝis firma ĵuro de la vastaj amasoj de la laboristoj. Ĉe la konstruejo de la laststadia konstruo aperis multaj kortuŝaj heroaĵoj. Ĝuste kiam la konstruo troviĝis en la stadio de enmeto de krudaĵoj kaj estis tuj produktota ureo, subite aperis liko ĉe la flanĝo alfiksita al la premgaŭĝo de la elkonduka tubo de la sinteza urea turo, kaj grandkvante ŝprucis nazpika alttemperatura fandaĵo sub altpremo. En palpebruma daŭro amoniaĵo dense nebuliĝis super la sinteza turo. Aperis tre kriza situacio. Antaŭ la vizaĝo stariĝis demando: Aŭ bremsi la maŝinon aŭ tuj organizi fortojn por urĝriparo. Laŭ la malnova rutino estis malpermesate ripari tubojn de ekipaĵo sub altpremo. Tamen, se oni bremsus la maŝinon por ripari, tio prokrastus la tutan procezon de la konstruo, kaj la klasaj malamikoj kaptus ŝancon por fabriki onidirojn kaj konduki subfosadon. Alfrontante la alttemperaturon, altpreman fandaĵon kun akraodoro, la ĉeestantaj laboristoj estis minacataj de brogo kaj veneno en ĉiu momento.

En tiu ĉi kriza momento, kamaradoj de la konstrueja komandejo kaj de la propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong de PLA en la fabriko persone iris al la akcidentejo kaj elmetis la batalan sloganon "firme kaj nepre elripari". Veterana laboristo Ĝong Suoming la unua surportis la gasmaskon, ekprenis la ŝraŭbilon kaj fulmrapide ascendis la tursupron por urĝriparo, lin sekvis Fan Ĉanĝin k. a. kaj ankoraŭ multaj aliaj unuj post aliaj..... Post 40-minuta intensa lukto ili fine fiksas firme la flanĝon kaj eliminis la akcidenton.

Nekalkuleblaj estis la heroaĵoj de la laboristoj. La ĉina laborista klaso armita per la penso de Maŭ Zedong povas konkeri ĉian ajn malfacilon kaj venki ĉian ajn insidan kaj ruzan malamikon.

III

Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ "La plej grava punkto en la reformo de ŝtataj organoj estas

intima ligo kun la amaso," kiel ordinaraj laboruloj la membroj de la revolucia komitato batalis kune kun la laboristoj ĉe la konstruejo. Kie troviĝis malfaciloj kaj problemoj, tien ili iris por solvi. Krome ili fervore entreprenis teknikan renovigon kaj teknikan revolucion ŝultro-ĉe-ŝultre kun la laboristoj, tial ili ĝuis subtenon kaj amon inter la amasoj. Kamarado Ding Vejĵuan, estinta elektroveldisto kaj nun respondeculo de la konstrueja komandejo sub gvido de la revolucia komitato, rimarkis ke oni devas elspezi tre multan tempon por purigi la levtubojn kaj mallevtubojn de la sinteza turo kun flankprodukto de vaporo. Se oni ne trovas rimedon por plibonigo, tio certe influos la konstruan rapidecon. Por solvi la problemon li iris al la laborista loĝdomo post la laborhorro por interkonsiliĝi kun la veteranaj laboristoj Vang Ĝinĵong, Ĝia Pengteng, Kju Ŝikuan k. a. Ili kuraĝe rompis la malnovajn rutinojn kaj alprenis novan rimedon de purigado, kaj fine ili plenumis la purigadon en tre mallonga tempo.

En la ŝlosila momento de urĝa riparo al la lika flanĝo alfiksita al premgaŭĝo de la elkonduka tubo de la sinteza turo, membroj de la revolucia komitato Ĝaŭ Jong k. a. kaj parto de kamaradoj de la propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong de PLA en la fabriko ĵetis sin unuj post aliaj en tiun ĉi urĝriparan batalon. Kiam ili trovis ke la vento ĝisoste frostigis la urĝriparantajn laboristojn, kies vatitaj vestoj estis tute malsekigitaj de ureo, ili tuj alportis sekajn kaj petis la kuiristojn ĝustatempe prepari noktan manĝon por la laboristoj. Kiam la laboristoj ricevis bovlojn kun vaporanta vermiĉelo, iu veterana laboristo diris ekscitite: "Ĉiu vatita vesto entenas varmon de la profunda amo de la proletaro, ĉiu bovlo da vermiĉelo portas la amikecon de la klasaj fratoj. Nur la revolucia komitato — la ruĝa regpotenco kiun Prezidanto Maŭ starigis por ni, komprenas la koron de ni laboristoj kaj zorgas pri nia sano." La revolucieca stilo de la membroj de la revolucia komitato ligiĝi kaj dividi ĝojon kaj malĝojon kun la amasoj ricevis laŭdon ĉe la laboristoj. La nove naskita revolucia komitato rompis la malnovajn rutinojn kaj la malraciajn regulojn. La problemoj en produkto, kiuj povas esti solvitaj en grupeto aŭ grupo, ne estas transdonitaj al laborejo, kaj tiuj problemoj, kiuj povas esti solvitaj en laborejo, ne estas transdonitaj al la fabrika administrejo. Prenu la grandskalan riparadon de la sinteza turo kiel ekzemplon. La revolucia komitato kunvokis

al la sinteza turo respondeculojn de la koncernaj laborejoj de elektro, de precizaj instrumentoj, de ekzameno kaj riparo kaj de sintezo, por ke la laboristoj, la projektistoj kaj la laborejaj kadroj kune interkonsiliĝu kaj ellaboru projekton de riparado. Kaj poste la laboroj estis rekte asignitaj al ĉiuj koncernaj grupetoj kaj grupoj, kaj tiel la tasko de grandskala riparo de la sinteza turo estis rapide plenumita.

La revolucia komitato turnis la konstruejon en batalkampon de amasa revolucia kritiko kontraŭ la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la fabriko. La laboristoj citis grandan nombron da faktoj por malkovri kaj kritiki la krimojn de "rampisma filozofio". En la komenco de la laststadia konstruo, utiligante la de ĝi uzurpitan potencon la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la fabriko elspezis koloson da fremdlanda valuto por importi de Britio tri specojn de katalizilo. Tiam ili tute ne kredis ke la laborista klaso de nia lando povas ilin krei en unu jaro. Tamen la fakto de historio estas kruela. Antaŭ ol la kataliziloj de Britio alvenis, la tri novtipaj kataliziloj kreitaj de nia lando jam estis alportitaj al la konstruejo. Tio donis solidan vangfrapon al Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj.

La konstruejo estas ankaŭ ekzamenejo por la reakciaj teknikaj "aŭtoritatuloj". Laboristo ekprenis manplendon da grajna amoniaka nitrato, venis antaŭ la ĉefinĝenieron kaj demandis lin: "Kio estas tiu ĉi produktaĵo?" Kaj tiu respondis: "Ureo." Tiu erara respondo tute senmaskigis tiun teknikan "aŭtoritatulon" — fifaman ĉefinĝenieron. Tuj ĉe la loko eksplodis malestimaj mokoĵoj, kio ĵetis tiun ĉi reakcian "aŭtoritatulon" en grandan embarason. Li ne povis ne mallevi la kapon kaj konfesis sian fiaskon.

Renkonte al la ŝtormoj de la klasa batalo kaj produkta batalo, la revolucia komitato konstante firmiĝis kaj perfektigis. Ĝi ludis rolon de batalanta komandejo en la laststadia konstruado.

La grandioze ondanta granda proletara kultura revolucio senprecedence vaste kaj profunde mobilizis la amasojn, la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ senprecedence profundigis en la koron de la popolo, kaj la saĝo kaj kreivo de la revoluciaj amasoj estis plene disvolvigitaj. Plenaj de revolucia nobla patoso la laboristoj kaj oficistoj de la tuta fabriko strebas al pli elstaraj novaj atingoj omaĝe al la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio.

PRESADO PER PLASTA PLATO ANSTATAŬ STEREOTIPO

La laboristoj de plasta, papera kaj presa industrioj en nia lando efektivigis gravan teknikan revolucion en presado — anstataŭigi la tradician stereotipon per plasta plato en presado kaj tiel plenigis mankon en la presa industrio de Ĉinio. Tiu ĉi reformo kreas favorajn kondiĉojn por pli multa, pli rapida, pli bona kaj pli ekonomia presado de la verkoj de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

En la presado per plasta plato oni nur prenas malpezan kaj maldikan platon de plasto kaj hejtpremas ĝin al kompostaĵo farita laŭ manuskripto. Tiamaniere la plasta plato estas pretigita kaj poste sendata rekte al la pres-maŝino por uzo. Sekve oni ne plu bezonas fari matricon, gisi stereotipon aŭ galvanizi, la produkt-procedo estas multe plisimpligita, la tempo por pretigi platon estas malplilongigita kaj la labor-efiko estas plialtigita.

REFORMITA VAPOR-LOKOMOTIVO

Reformita vapor-lokomotivo aperis en la lokomotiva sekcio de Ŝigiaĝuang. Ĝi povas regajni el la ellasita vaporo grandan kvanton da varmenenergia, kiu, cirkuligite, produktas novan vaporon. Tio estis neniam realigita en la historio de disvolviĝo de vapor-lokomotivo.

La reformita vapor-lokomotivo konsumas malpli da karbo, havas grandan tir-forton kaj veturas per alta rapideco. Ankaŭ la labor-intenseco de la hejtisto estas malplialtigita. Ĝi konsumas 54 kilogramojn da karbo po 10,000 tun-kilometroj, tiu kvanto estas 26 procentojn malpli multa ol tiu, kiun la nereformita lokomotivo de la sama tipo konsumas sub la samaj kondiĉoj. La konsumkvanto de akvo estas je 31 procentoj malplialtigita. Tiu sukceso estis efektivigita de la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la lokomotiva sekcio de Ŝigiaĝuang por omaĝi ĝin al la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio.



La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj konstruantaj la Rel-traban Fabrikon de Baŭtoŭ-a Ferŝtala Kompanio okazigas kunvenon pri kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ ĉe la konstruejo.

Sukcesa Finkonstruiĝo de Rel-traba Fabriko de Baŭtoŭ-a Ferŝtala Kompanio

BAŬ KAJ

MENZE de la kantado pri la kompleta venko de la granda proletara kultura revolucio alflugis triumfa informo el la ŝtala urbo sur la stepo: Alia moderna granda laminatejo de nia lando — Rel-traba Fabriko de Baŭtoŭ-a Ferŝtala Kompanio — estas sukcese finkonstruita unu jaron pli frue ol laŭ ĝia plano, kaj la produktado tie jam oficiale komenciĝis.

La plifruigita finkonstruiĝo de tiu ĉi grandskala rel-traba fabriko denove plene montris la senkomparan potencon de la granda penso de Maŭ Zedong. Sub la direktado de sinsekvo da plej novaj instrukcioj de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ la vasta amaso de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Dua Metalurgi-konstrua Kompanio de la Ministerio de Metalurgio, kiuj respondecis pri la konstruado de tiu ĉi fabriko, kvar-

foje reviziis la konstru-planon kaj fojo post fojo malplilongigis la tempon por konstruado. Kun heroa spirito la laboristoj diris, ke ili nepre plifruigos la planon pri komenco de produktado kaj efektivigos ĝin en la fino de 1968 anstataŭ en la fino de 1969, por sendi tiun ĝojigan novaĵon al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj fari ĝin kiel omaĝon por la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio.

La novtipa hejtfornejo, kiun la laborista klaso de nia lando mem projektis kaj konstruis kaj kies partojn ili mem fabrikis, malfermis novan vojon por la racia utiligo de hejt-fonto en la metalurgia industrio de nia lando.


Tuj post sia alveno al la konstruejo la laboristoj, kiuj respondecis pri la kunarango de konstruaj

partoj de la ĉefa laborejo, diris: “Ni nepre kreos plej elstarajn atingojn en produktado kaj gajnos gloron por nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ.” Ili laboris en alteco de pli ol 20 metroj kaj persistis en laboro sur tiu batalejo eĉ kiam pluvas aŭ ventas. La laboristoj, kiuj okupis sin pri instalado de mekanikaj kaj elektra-povaj ekipaĵoj, fininstaligis en unu monato tian kvanton da ekipaĵoj, kia superis la tutan kvanton de ekipaĵoj instalitaj en la pasinta pli ol unu jaro. Post akcepto de la tasko instaligi grandajn laminatilojn, la laboristoj de la instal-grupo sub la gvido de veterana laboristo Ĝoŭ Baŭhiang ripetade studis la “tri popularajn artikolojn”, brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ. Kiam ili trovis, ke la malnova tekniko de la pasinteco ne povis akomodi sin al la antaŭensaltego de la tuta konstruado, ili prenis k-don Bethune

kiel sian ekzemplon, strebadis ĉiam al pli alta nivelo en sia tekniko, multfoje faris diskutojn kaj eksperimentojn, ekaplikis novan teknikon kaj plenumis en 12 labortagoj la taskon, kiun oni bezonis 120 labortagojn por plenumi laŭ la antaŭa plano. Ankaŭ la kvalito de la instal-laboro estis multe plialtigita.

Uzinte nur pli ol kvar monatojn por instaligi pli ol 10,000 tunojn da diversaj ekipaĵoj kaj kreinte 65 gravajn teknikajn renovigojn, la heroaj konstruantoj de Baŭtoŭ-a Ferŝtala Kompanio finfine laminatis en la 26-a de decembro 1968 la unuan kolekton da grandtipaj ŝtalaĵoj en Baŭtoŭ-a Ferŝtala Kompanio kaj efektivigis sian heroan ĵuron sendi ĝojigan novaĵon al Prezidanto Maŭ kaj fari omaĝon por la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio.

Reprezentantoj el diversaj lokoj de la lando vizitas laborejon de Rel-traba Fabriko de Baŭtoŭ-a Ferŝtala Kompanio.



Pri Prezidanto Maŭ Sopiras la Liberigitaj Servutuloj

Tibetano ĈIMEDVANGDUL

*Koloraj nuboj dancas, neĝlotusoj pompe floras,
Sur la neĝmont' kaj stepo ĉie flirtas ruĝaj flagoj.
Pri Prezidanto Maŭ sopiras la liberigitaj servutuloj en nokt-tagoj,
Ja Prezidanto Maŭ lumigas la neĝmonton kaj la stepon kiel suno oras!*

*En la pasint' la stepo kvankam vastis sen komparo,
Ni servutuloj tamen ne posedis lokon por tervazo.
Sub la neĝmonto estis mil kaj mil amasoj da sekalo,
Ni servutuloj tamen ne disponis lignan bovlon da manĝaĵo.*

*Ho, Prezidanto Maŭ, gvidanto nia granda!
Vi savis nin el maro de sufer', nin portis al sunhelo,
Sed Liu Ŝaŭki, la renegat', intencis puŝi nin en la abismon de mizero.
Li vere estas lup' kruela kaj venenaj skorpio kaj vipero!*

*Ho, Prezidanto Maŭ! La bril' de via penso granda
Naciojn ĉiujn al triumfa front' direktas kaj inspiras.
Kaj ni, liberigitaj servutuloj, milmil-foje, ho, deziras
Al Vi, l' amata, vivon longan, vivon longan, vivon longan!*

Brila Sukceso Akirita de Ĉinio en Grandskala Multampleksa Observo pri Plena Suneklipso

EN la bonega situacio, en kiu la granda proletara kultura revolucio iniciatita kaj gvidata persone de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ estas akirinta grandan, decidan venkon, scienc-esplora grupo gvidata de la laborista klaso kaj konsistanta el laboristoj, komandantoj kaj batalantoj de PLA, revoluciaj kadroj, revoluciaj sciencaj laborantoj kaj revoluciaj junuloj, alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, kondukis senprecedence grandskalan multampleksan observon pri la plena suneklipso vidiĝinta super la regiono de Hingiang en la 22-a de septembro 1968, akiris brilan sukceson, faris novan kontribuon en la servigo de la ĉina scienca esplor-laboro rekte al la socialisma konstruado kaj envicigis Ĉinion inter la antaŭirantaj landoj rilate al observo de la suneklipso. Tio estas granda venko de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong kaj granda venko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ!

Tiu ĉi tasko de observo de plena suneklipso, de ĝia starigo ĝis ĝia plenumo, ĉiam ricevis intiman prizorgon kaj subtenon de la proletara komandejo kun Prezidanto Maŭ kiel estro kaj Vicprezidanto Lin kiel vicedstro. En la 20-a de majo de la pasinta jaro, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko Vicprezidanto Lin akceptis la delegitojn de la kongreso de aktivuloj en kreiva studo kaj kreiva apliko de la penso de Maŭ Zedong de PLA, Ĉina Akademio de Sciencoj kaj aliaj unuoj, kaj donis grandan kuraĝigon kaj neelĉerpeblan forton al la tuto de la kamaradoj partoprenantaj la observon de la plena suneklipso.

La grupo, kiu prenis sur sin la taskon de multampleksa observo pri la plena suneklipso, estis

formita de pli ol cent laboristoj, revoluciaj sciencaj laborantoj kaj revoluciaj junuloj el pli ol dek unuoj inkluzive de la Pekina Astronomia Observatorio, la Ziginŝan-a Astronomia Observatorio, la Instituto pri Geofiziko kaj la Instituto pri Atmosfera Fiziko sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, kaj ankaŭ la Centra Meteorologia Buroo, altaj lernejoj, la Nacidefenda Scienca kaj Teknika Komitato de PLA kc. Ili faris observojn surtere kaj alte en la aero en tiuj lokoj de la okcidenta parto de Hingiang, kie vidiĝis la plena kaj parta suneklipsoj.

Tiu ĉi observo inkluzivis kelkdek stud-temojn, kiaj kuna observo pri la influo de la regionoj de la suna aktivado al la jonosfero, alte-en-aera kaj surtera observoj pri korono-zodiaka lumo, kaj la influoj de la suneklipso al geofiziko kaj la atmosfero ktp. En la kuna observo pri radiojonosfero, oni akiris riĉan multampleksan materialon pri la influo de la regionoj de aktivado de la suno al la jonosfero. La observo pri korono-zodiaka lumo estis kondukita per aerplano kun nehermeta kajuto en alteco de 11,000 metroj, kaj oni havigis al si observ-rezultojn rilate al tre vasta spaco ĉirkaŭ la suno, kiuj multege superis la mondan nivelon. Kaj samtempe oni ankaŭ faris tre klarajn fotojn pri la korono, akiris grandan kvanton da donitaĵoj pri la influo de la plena suneklipso al la atmosfero kaj geofiziko, plue disvolvis la studon pri la rilato inter la suno, luno kaj terglobo, kaj rompis la monopolon de la landoj de imperiismo kaj moderna reviziismo pri materialoj de eklipso de la suno.

La brilaj rezultoj akiritaj en tiu ĉi observo pri la plena suneklipso pruvis la senkomparan korek-


tecon de la principo serviĝi sciencan esploron al la proletara politiko, la nacidefenda konstruado kaj la nacia ekonomia konstruado, kaj montris la heroismon de la ĉina popolo, kiu havas altan volon kaj kapablon atingi kaj superi la mondan antaŭirantan nivelon de scienco kaj tekniko.

Tiu ĉi observo pri plena suneklipso iris dum la intensa batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj. Tiel frue kiel en 1962 la agentoj de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki en la scienca rondo kaj la burĝaraj reakciaj akademias "aŭtoritatoj" jam kontraŭstaris, en konferenco pri planado de scienca esplorado, la kondukon de observo pri la plena suneklipso en Hingiang-regiono en 1968, kun preteksto ke "la kondiĉoj por observo estas malbonaj, oni akiros nenian sukceson, kaj mankas scienca valoro". La granda proletara kultura revolucio iniciatita kaj gvidata persone de Prezidanto Maŭ ĝisfunde frakasis la kontraŭrevolucion reviziisman linion praktikitan de la n-ro 1 enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la sciencaj rondoj, kaj stimulis la revolucionan entuziasmon kaj aktivecon de la vasta amaso de laboristoj kaj sciencaj laborantoj sur la fronto de scienca esploro. En marto de la pasinta jaro, kelkaj "malgrandaj personoj" en la Ĉina Akademio de Sciencoj denove elmetis tiun ĉi sciencan esportemon kaj ricevis la aprobon de la vasta proletara revoluciularo sur la fronto de scienca esploro kaj la subtenon de la diversgradaj revolucionaj komitatoj de koncernaj organizoj. La kamaradoj partoprenantaj tiun ĉi multamplaksan observon pri la plena suneklipso malkovris la malnoblajn kaj senhontajn krimojn de la sovetunia reviziismo kaj ĝisfunde kritikis la damnindajn krimojn en scienca esploro-laboro faritajn de Liu Ŝaŭki, lakeo de imperiismo, moderna reviziismo kaj kuomintangista reakciularo, kaj liaj agentoj. Ili decidis

gajni venkon en tiu ĉi politika batalo kontraŭ imperiismo kaj reviziismo kaj por atingi kaj superi la mondan avangardan nivelon de scienco kaj tekniko.


Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruis al ni "La laborista klaso nepre devas gvidi ĉion". La kamaradoj laboristoj, kiuj partoprenis tiun ĉi observadon pri plena suneklipso, plej profunde komprenis la proletaran revolucionan linion kaj sinsekvon da plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ kaj efektiviĝis ilin kun plej granda decidemo. Dum la plenumado de la tasko la laboristoj aperis tie, kie troviĝis malfaciloj, kaj ili gvidis la aliajn kamaradojn kreive studi kaj kreive apliki la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj okazigis kunvenon pri kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ tie, kie leviĝis demandoj. Ili gajnis venkon unu post alia prenante la brilan penson de Prezidanto Maŭ kiel armilon. Ili plene ludis sian gvidan rolon en partoprenado de la tuta procedo de projektado, fabrikado, instalado kaj reĝustigo de instrumentoj, observado sur la loko kaj prilaboro de donitaĵoj. La revolucionaj sciencaj laborantoj kaj revolucionaj junuloj, kiuj partoprenis tiun ĉi observadon pri plena suneklipso, profunde komprenis el sia praktiko, ke la laborista klaso havas riĉan sperton pri la tri grandaj revolucionaj

Ĉe memfarita optika teleskopo la revolucionaj junuloj kaj batalanto de PLA intense kondukas la preparan laboron antaŭ la batalo.



movadoj — klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento, kaj ke necesas gvidado de la laborista klaso kaj partoprenado de la laborista amaso por akiri grandan sukceson en scienca esplorlaboro. Laborante ili dividis la ĝojon kaj malĝojon kun la laboristoj, batalis tage kaj nokte kaj konscie ricevis reedukon de la lastaj, kaj ricevis laŭdon de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

Dum la plenumado de la tasko la vasta amaso de komandantoj kaj batalantoj de PLA timis nek malfacilojn nek danĝerojn, kuraĝe prenis sur sin pezajn ŝarĝojn, disvolvis sian sentiman heroismon kaj revolucionan spiriton de kompleta sindonemo por aliaj sen ajna konsidero pri si mem, kaj faris novan kontribuon por la popolo. La sukceso de tiu ĉi mult-faka observo kaj esploro pri la plena suneklipso estas grandega frukto en la tenado de la revolucio kaj la stimulado de la produkto sub la gvido de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. La scienca esplor-entrepreno de nia lando estas antaŭeniranta per grandaj kaj rapidaj paŝoj laŭ la brila direkto montrita de Prezidanto Maŭ.



Posttagmeze de la 22-a de septembro, 1968, aperis plena suneklipso super la okcidenta regiono de nia lando.

MATERIALO

Pri Suneklipso kaj Ĝia Studo

Suneklipso estas natura fenomeno. La observo pri tiu natura fenomeno havas longan historion en Ĉinio. Jam antaŭ pli ol 3,200 jaroj la laboranta popolo de nia lando faris la unuan observon kaj noton pri plena eklipso de la suno en la historio de la homaro, postlasante valoran sciencajn riĉaĵojn por la homaro.

Kiel fariĝas eklipso de la suno? Kiel oni scias, la luno kaj la terglobo moviĝas senĉese. La luno rotacias ĉirkaŭ la terglobo, kaj la terglobo siavice rotacias ĉirkaŭ la suno. Kiam la luno venas rotacianta inter la terglobon kaj la sunon kaj la tri troviĝas proksimume sur rekta linio, tiam la luno kovras la sunon, kaj sekve fariĝas eklipso de la suno. Se parto de la suno estas kovrita, tiam fariĝas parta eklipso. Se la tuto de la suno estas kovrita, tiam fariĝas plena eklipso. Kaj se la meza parto de la suno estas kovrita, tiam fariĝas ringforma eklipso.

La suno estas varmega gas-globo. La aktivado de la suno havas tre grandan influon al la radia komunikado kaj kelkfoje eĉ interrompas la mallongdistanca komunikado. La aktivado de la suno ankaŭ donas diversajn influojn al la elektromagnetaj kampoj de la terglobo kaj al la klimato. Tial la studo pri la suno havas tre grandan valoron por nacia defendo kaj nacia ekonomio.

Kiam la eklipso de la suno aperas, tiam estas tre grava ŝanco por studi la sunon. En ordinara tempo multaj sciencaj fenomenoj sur la suno estas neobser-

veblaj aŭ misformitaj sur la terglobo pro la influo de la atmosfero de la terglobo. Tio alportas nemalmultajn malfacilojn al la studo pri la suno, kaj precipe la ĉirkaŭa parto de la suno — la korono — estas malfacile observebla. Dum la plena eklipso de la suno, la luno kontinue sed malrapide kovras kaj forlasas ĉiun parton de la surfaco de la suno donante al ni okazon por studi ilin kaj ilian influon al la jonosfero. Kvankam multaj modernaj avangardaj instrumentoj povas esti uzataj por studi la sunon en ordinara tempo, tamen sun-eklipso prezentas multe pli favoran ŝancon por studo pri la suno.

En la pasinteco la landoj de imperiismo kaj moderna reviziismo kaj kelkaj burĝaraj reakciaj akademioj "aŭtoritatoj" en nia lando longe praktikis monopolon super la moderna observo kaj studo pri sun-eklipso kaj koncernaj materialoj. Ĉi-foje, sub la direkto de la proletara scienc-esplora linio de Prezidanto Maŭ la laborista klaso, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, PLA, revoluciaj junuloj kaj revoluciaj sciencaj laborantoj de nia lando faris grandskalan, memstaran kaj multampleksan observon pri la plena suneklipso vidiĝinta en Hingiang, akiris gravajn atingojn, ĝisfunde ĉesigis la longdaŭran monopolon super la moderna observo de sun-eklipso kaj ĝiaj materialoj kaj alte starigis la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong en la kampo de studo pri sun-eklipso.

La Elstara Kompartiano

Huang Mucaj

POR sekurigi junajn ruĝajn gvardianojn kaj ŝtatan posedajon, la kompartiano kamarado Huang Mucaj, plotonestro de la dua roto de iu trupo de PLA, brave kaj obstine luktis en batalo por estingi fajregon kaj ricevis seriozan vundon. En tio li plene elmontris la noblan kvaliton de kompartiano kun fidela koro al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj varma amo al la popolamasoj.

Antaŭtagmeze de la 30-a de aŭgusto, 1968, ĝuste kiam kamarado Huang Mucaj, kiu estis sendita por plenumi la taskon de milita trejnado en la Deko Mezlernejo de Kingdaŭ, faris preparojn por doni helpon al junaj ruĝaj gvardianoj en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ en ĉambro sur la supera etaĝo, subite ekbrulegis eksteratente la aŭto, kiu ĵus veturis en la pordon de la lernejo kaj estis ŝarĝita per forta azotacido kaj forta sulfuracido. Aŭdinte tion Huang Mucaj tuj fluge rapidis malsupren al la fajrejo. Post obstina batalado li fine subpremis provizore la densajn fumojn kaj fortan fajron kune kun la amasoj. Tiam, Huang Mucaj subite ekrimarkis, ke azotacido el likanta vazo gutas sur la flankan oleujon de la aŭto, kiu pro tio povas eksplodi en ĉiu momento. Se la oleujo ekbrulos, tio certe kaŭzos eksplodon de la tuta aŭto, ŝarĝita per kemiaĵoj. Tiam neimageblaj damaĝoj estos portataj al la vivoj de la ĉirkaŭe troviĝantaj popolamasoj kaj domego de la lernejo. Tre danĝera estis la stato! Tiutempe Huang Mucaj kriegis: "Rapidu, tuj deportu la fenditan vazon de sur la aŭto!" Aŭdinte tion, iu sur la aŭto levis la fenditan vazon kaj ĝin pasigis malsupren. La juna ruĝa gvardiano Ven Ĉunŝeng senhezite etendis siajn manojn por ĝin transpreni. Tuj kiam liaj manoj tuŝis la malsupron de la vazo, ili estis brulvunditaj de la forta azotacido. Ven Ĉunŝeng ekstremis tutkorpe pro dolorego. Estis videble, ke la vazo tuj falos kaj okazos granda akcidento!

En tiu kriza momento Huang Mucaj alsturmis! Azotacido havas fortan kaŭstikecon, kaj povas difekti eĉ ŝtalon kaj feron. Sed Huang Mucaj pensis: Se la vazo falos sur la teron, la azotacido disĵetiĝos kaj serioze endanĝerigos la vivon de la ĉirkaŭe troviĝantaj amasoj. En tiu momento ĉe liaj oreloj vibris nur la sola sono: **"Niaj trupoj ekzistas ekskluzive por la liberigo de la popolo kaj laboras senrezerve por la interesoj de la popolo."** Kaj lian koron regis nur la sola penso: "Kiel kompartiano mi devas protekti la vastajn popolamasojn, eĉ se tio kostus mian vivon!" Li ekkriis laŭte: "Tio estas danĝera, iru flanken! Lasu ĝin al mi!" Huang Mucaj alsaltis kaj transprenis el la manoj de Ven Ĉunŝeng la vazon pezan je pli ol cent ĝinoj. Timante rompiĝon de la vazo pro rapida meto sur la teron, li sin ordonis: "Malrapide! nepre malrapide!" Subite, "pum!" la vazo rompiĝis. Kaj la tuta azotacido disfluis el la vazo kaj tuj sur la korpo de Huang Mucaj leviĝis flava fumo.

La junaj ruĝaj gvardianoj kaj la popolamasoj estis eldanĝerigitaj, sed kamarado Huang Mucaj, bona batalanto de Prezidanto Maŭ kaj bona filo de la popolo, estis grave vundita.

Junaj ruĝaj gvardianoj urĝeme subtenis Huang Mucaj al la kranon por forlavi de li la azotacidon. Ĵus kiam ili turnis la kranon, alkuris du ruĝaj gvardianoj ankaŭ vunditaj de azotacido. Spite al forta doloro Huang Mucaj cedis la lokon al la postvenantoj dirante: "Lavu la ruĝajn gvardianojn unue, nenio grava estas ĉe mi!" Kun tiuj vortoj Huang Mucaj svene falis ĉe la kranon.....

En la ĉambro por urĝaj malsanoj de la hospitalo, tiel doloris Huang Mucaj, ke li tute paliĝis kaj lia vizaĝo senĉese ŝvitis ŝpruce. La kuracisto decidis tuj lin ŝmiri per medikamento kaj bandaĝi. Sed Huang Mucaj decideme diris:



Dum kuracado en la hospitalo Huang Mucaj konservis intiman ligon kun la amasoj. Jen li interparolas kun kuracistoj kaj flegistinoj.

“Unue savu la ruĝajn gvardianojn, nenio grava estas ĉe mi!”

“Tio estas danĝera, iru flanken! Lasu ĝin al mi!”

“Unue savu la ruĝajn gvardianojn, nenio grava estas ĉe mi!”

El tiuj du mallongaj frazoj, ĉiu vorto brilas per la senlima fideleco de la revolucia batalanto al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kaj entenis la senkompare varman amon de la armeano el la filoj de la popolo al la popolamasoj!

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“La linio de la Komunista Partio ja estas la linio de la popolo.”** Kamarado Huang Mucaj profunde komprenas la instruon de Prezidanto Maŭ. Li diris: “Por esti senlime fidela al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, ĉio pensata, preparolata kaj farata devas esti konforma al la interesoj de la plej vastaj popolamasoj. Amo

al la amaso ja signifas fidelecon al Prezidanto Maŭ.”

En januaro de 1967, Huang Mucaj revenis hejmen por vidi siajn familianojn. Alveninte al sia hejmo forlasita jam kvin jarojn, anstataŭ ripozi, li tuj faris vizitojn sinsekve al la malriĉ-kampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj en sia vilaĝo. Kiam li venis al la domo de la 85-jara avino Ĝoŭ, kiu multe suferis en la malnova socio, li sentis al ŝi apartan intimecon. Kvazaŭ en sia propra hejmo, li jen parolis kun la maljunulino pri la hejmaj aferoj kaj propagandis al ŝi la grandajn venkojn akiritajn de la granda kultura revolucio, jen vektportis akvon por plenigi la akvuĵon kaj balais ĉambron kaj korton. Ĉion ĉi tion aŭskultante kaj vidante la maljunulino kortuŝiĝis ĝis varmaj larmoj en la okuloj. Kun profunda dankemo ŝi diris karesante Huang Mucaj: “Bona estas Prezidanto Maŭ! Bona estas la Kompartio! Bona estas la Liberiga Armeo!”

La samvilaĝaj malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj fiere diris: “Mucaj ja estas bona posteulo de ni malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj, li ligiĝas kun ni koro al koro.” Frumatene en la sekvinta tago post sia hejmvveno, Huang Mucaj surŝultrigis ŝpaton kaj iris al la kampo por labori kune kun la komunumanoj. Dum la 13 tagoj de sia restado en la hejmo, li ĉiutage studis verkojn de Prezidanto Maŭ kaj laboris kune kun la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj. Kun profunda konvinkiĝo li diris: “Per vekto kaj ŝpato oni povas konservi la rilatojn de sango kaj karno kun la amasoj, garantii nekoruptiĝon de la penso kaj elhardi ruĝan koron fidelan al Prezidanto Maŭ.”

Kamarado Huang Mucaj profunde komprenas, ke propagandi la penson de Maŭ Zedong al la

amasoj kaj armi ilin per ĝi estas plej granda amo al ili. Kun plej alta politika fervoro kaj plej granda decidemo li propagandis al la vastaj revoluciaj amasoj la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ. En aŭgusto de 1966, kiam Prezidanto Maŭ donis la instrukcion “**Vi devas zorgi pri la ŝtataj aferoj, kaj konduki la grandan proletaran kulturen revolucion ĝis la fino**”, Huang Mucaj, kiu tiam deĵoris en vagonaro, tuj propagandis ĝin al la vastaj amasoj. Por pli efikigi la propagandon, li venkis multajn malfacilojn kaj verkis tuj en la nokto literaturajn kaj artajn programerojn por esti fervore prezentataj al la pasaĝeroj en la sekvonta tago. Iufoje li kaj liaj kamaradoj faris prezentadon de la unua vagono ĝis la dekdua kaj pro longtempa prezentado ili tre laciĝis kaj iliaj langoj sekiĝis. Kiam ili trovis, ke en la lasta vagono troviĝas nemultaj pasaĝeroj,

Post la elhospitaliĝo kamarado Huang Mucaj aliĝis al la propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong organizita de la trupo kaj venis al la produkta brigado por teni la revolucion kaj stimuli la produkton kune kun la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj.



iuĵ el ili diris: “Lasu, la spektantoj eĉ estas malpli multaj ol la prezentantoj!” Sed Huang Muĉaj diris: “Pli da homoj aŭdu la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ, tio signifas pli da fortoj en efektivigado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Ni devas persisti en prezentado, eĉ se troviĝas nur unu pasaĝero.” Unuiginte la konon ĉiuj tuj eniris en la dektrian vagonon kaj serioze faris prezentadon por la kelkaj pasaĝeroj. En la granda proletara kultura revolucio Huang Muĉaj prenis la propagandon de la plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ kiel sanktan mision. Kie troviĝas amasoj, tien li iras por propagandi ilin, eĉ en hospitalo post ricevo de serioza vundo, li ankoraŭ ne forgesis propagandi la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ. En la kvina tago post lia veno al la hospitalo, kiam Huang Muĉaj estis ĵus operaciita kaj lia kapo ankoraŭ estis ne klara, li persiste studis vorton post vorto la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ: “**En la efektivigo de la proletara revolucio en eduko, nepre necesas havi la gvidadon de la laborista klaso.**” Kiam la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj de la Dekaj Mezlernejoj de Kingdaŭ lin vizitis, spite al doloro kaj laciĝo, li foje-foje propagandis al ili la supre diritan instrukcion de Prezidanto Maŭ kaj ripetade admonis ilin: “Nepre humile estu lernantoj de la laborista klaso kaj konduku la grandan kulturen revolucion en via lernejo ĝis la fino!”

En aŭgusto de 1962 Huang Muĉaj aliĝis al PLA — la granda lernejo de la penso de Maŭ Zedong. Sub la helpo de malnovaj kamaradoj, li diligente studis la “tri popularajn artikolojn” kiel sentencon, por reformi sian mondkoncepton. En la unua jaro de sia aliĝo al la armeo li jam diligente studis la verkojn de Prezidanto Maŭ, faris notojn kaj skribis komprenaĵojn. Ju pli li studis, des pli klariĝis lia kapo, kaj des pli inklinis lia koro al Prezidanto Maŭ. En la granda proletara kultura revolucio, li ankoraŭ pli konscie studas verkojn de Prezidanto Maŭ. Tuj post publikigo de ĉiu plej nova instrukcio de Prezidanto Maŭ li tuj ĝin studas kaj decideme efektivigas.



Huang Muĉaj faras insiginojn kun la portreto de Prezidanto Maŭ kune kun la revoluciaj junaj batalantoj de la Dekaj Mezlernejoj de Kingdaŭ.



En la Dekaj Mezlernejoj de Kingdaŭ kamarado Huang Muĉaj kune kun la revoluciaj junaj batalantoj studas la brilan instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ pri la iro de la intelektaj junuloj al la kamparo.

Ĉiuj kamaradoj kaj vastaj revoluciaj amasoj unuanime laŭdas ke Huang Muĉaj estas kompartiano plena de vigla freŝeco, nutrata de la penso de Maŭ Zedong.

Juna Teksistino Hju Hiuĝi

EN la Tria Ŝtata Kotona Ŝpinteksejo de Ŝi-giaĝuang, la vastaj revoluciaj laboristaj amasoj laŭdas Hju Hiuĝi, nomante ŝin “bona laboristino de Prezidanto Maŭ kaj elstara daŭriganto de la laborista klaso”. Sendube estas, ke ŝi atingis certajn sukcesojn en revolucio kaj produkto.

Hju Hiuĝi naskiĝis kaj kreskis en la familio de fervoja laboristo. Kiam ŝi ekhavis kapablon kompreni ion, la akuzoj indigne faritaj de ŝiaj gepatroj kontraŭ la malnova socio plenaj de sango kaj larmoj kaj ilia senlima amo al Prezidanto Maŭ kaj al la feliĉa vivo en la de li gvidata nova Ĉinio stampis sur ŝian infanan animon klasan brulmarkon de la laborista klaso klaran en amo kaj malamo.

En aŭgusto de 1958, kiam Hju Hiuĝi atingis la aĝon de 16 jaroj, ŝi transpaŝis la sojlon de la ŝpinteksejo, kun la nobla idealo ŝpini por la revolucio kaj teksti por la popolo. En la du jaroj en la fabriko, ŝi donis tre grandan atenton al

Hju Hiuĝi interŝanĝas korajn vortojn kun kamaradino.



studo de verkoj de Prezidanto Maŭ, elstarigis la proletaran politikon kaj diligente laboris super tekniko, ĉie manifestante sian revolucionan viglecon kaj energion de juneco de la juna generacio de la laborista klaso. En 1961 ŝi estis glorie akceptita en la Komunistan Partion de Ĉinio.

La granda proletara kultura revolucio iniciatita kaj gvidata persone de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ malkovris la internon de la nigra komandejo de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki. Solviĝis nun unu post alia la enigmoj, kiuj pezis sur la koro de Hju Hiuĝi de multaj jaroj. En la pasinteco, la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki en administrado de entreprenoj, kiaj “administrado de fabrikoj pere de specialistoj”, “tekniko en komando” kaj “stimulado per materio”, fidele efektivigita de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la ŝpinteksejo, havis profundajn venenajn influojn inter la laboristoj. Disputoj pri premioj tre malutile influis la unuigon inter la klasaj fratinoj. Antaŭ kvin jaroj, en iu monatfina premijuĝado, Hing Lanjing kaj An Lanfeng intermalpaciĝis kaj formiĝis nodo en la rilatoj inter ili, tiel ke dum multaj jaroj tiuj du klasaj fratinoj ne plu interparolis. Ju pli ŝi pensis pri ĉio ĉi tio, des pli vekigis ĉe ŝi ĝisosta malamo kontraŭ la reviziisma linio en administrado de entreprenoj efektivigita de Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la ŝpinteksejo. Dum tiu ĉi granda kaj intensa klasa lukto, kun ruĝa koro senlime fidela al Prezidanto Maŭ, ŝi sin ĵetis en la batalon kontraŭ diablaj ventoj kaj insidaj ondegoj, por ĝismorte defendi la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ, kaj iniciatis pionire malkovradon, akuzadon, kritikadon kaj eliminadon de la krimoj kaj venenaj influoj de Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la ŝpinteksejo.

En la ŝlosila momento por depreni la potencon el la manoj de plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la ŝpinteksejo, la klasaj malamikoj ne volontis akcepti la sorton de pereco. Sin kaŝante en mallumaj anguloj, ili faris sekretajn incitojn kaj insidajn agitojn, trompis kaj instigis parton da amasoj por turni la lancpinton de atako rekte kontraŭ la PLA-anojn en la ŝpinteksejo. Ripetade studante la instruon de Prezidanto Maŭ “**Sen popola armeo la popolo havas nenion**”, ŝi rapide travidis la intrigon de la klasaj malamikoj. Kiam ŝi trovis, ke iuj el ŝiaj klasaj fratinoj falis trompate en la kaptilon de la malamikoj, ŝi sentis grandan doloron en la koro. Kun profunda klasa sento ŝi faris klarigan laboron inter la trompataj amasoj. Entute sep fojojn ŝi persone vizitis la domon de la trompita laboristino Vang Hiujun por propagandi al ŝi la penson de Maŭ Zedong, rememori la pasintajn suferojn en komparo kun la nuna dolĉo kune kun la lasta, kaj vekti ŝian klasan konscion, tiel ke Vang Hiujun fine ekkonis la kriman intrigon de la klasaj malamikoj intencantaj subfosi nian ŝtalan grandan muron — la Popolan Liberigan Armeon. Tiam Vang Hiujun diris emociite kun varmaj larmoj: “Sen potenca popola armeo ne estus

loko por ni laborista klaso, nek estus emancipiĝo de la laboranta popolo. De nun mi neniam faros stultajon, kio dolorigas la intimulojn kaj ĝojigas la malamikojn.” Kaj nur kiam Vang Hiujun brave leviĝis por malkovri la krimojn de la klasaj malamikoj, Hju Hiuĝi eksentis, ke ŝi plenumis sian devon kiel klasa fratino.

Post tio, por subfosi la produktadon, la plenmano da klasaj malamikoj en la ŝpinteksejo denove intrigis instigante al iuj laboristoj forlasi sian produktan postenon. Kun plenkora malamo kontraŭ la klasaj malamikoj Hju Hiuĝi diris al siaj klasaj fratinoj en la grupoj kaj grupetoj: “Ni nepre ne lasu la klasajn malamikojn efektiviĝi la intrigon de detruo de la produkto. La revoluciaj laboristoj devas aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj persisti sur sia produkta posteno.” La ĉeestantaj fratinoj respondis unuvoĉe: “Ni absolute ne lasos eĉ unu maŝinon ĉesi. Ni portos la tutan ŝarĝon de produktado!” Hju Hiuĝi sola prizorgis dekojn da maŝinoj, kaj ŝi plurfoje



Kamaradino Hju Hiuĝi kaj kamaradoj de la revolucia komitato kune interkonsiliĝas pri laboro.

persistis labori kontinue eĉ en du sinsekvaj deĵoroj. Antaŭ la sentima spirito de Hju Hiuĝi kuraĝe surŝultrigi pezan ŝarĝon por la revolucio, la fratinoj en la grupeto profunde kortuŝiĝis. La laboristino Giaŭ Juĝen decideme diris: “Ni devas batali kune kun Hju Hiuĝi!” La intrigo de la klasaj malamikoj subfosi la produkton estis komplete frakasita de la vastaj revoluciaj laboristaj amasoj.

Post la publikigo de la granda instrukcio de Prezidanto Maŭ “**La laborista klaso nepre devas gvidi ĉion**”, la revolucia komitato de la ŝpinteksejo decidis sendi laboristan propagandan taĉmenton kun Hju Hiuĝi kiel estro al iu teatra trupo por gvidi tie la plenumon de la tasko de batalo, kritiko kaj reformo. En la komenco, Hju Hiuĝi ne havis sufiĉan memfidon por gvidi la batalon, kritikon kaj reformon en la teatra trupo pro la konsidero ke ŝi ne havas sciojn pri arto. Kiam ŝi malfermis la ruĝan trezoran libron kaj restudis la instruon de Prezidanto Maŭ “**Bona kamarado**

estas tiu, kiu pli deziras iri tien, kie la malfaciloj estas pli grandaj”, ŝi ek-sentis ke eĉ ekfulmo de timo antaŭ malfaciloj estas nefidelo al Prezidanto Maŭ. En la plena kunveno de la laborista propaganda taĉmento ŝi la unua malkaŝis sian egoismon kaj batalis kontraŭ ĝi, donante ekzemplon revolucii kontraŭ egoismo en la propra kapo. Kaj fine, ŝi diris kun plena fido: “Sinapogante sur la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, ni laborista propaganda taĉmento certe povos konkeri la batalpozicion de tiu teatra trupo.” Post kiam la propaganda taĉmento venis al la trupo sub ŝia gvidado, antaŭ ĉio la taĉmento faris profundajn



Kamaradino Hju Hiuĝi kunsidas kun geaktoroj pri la revolucia modela teatraĵo Ruĝa Signal-lanterno.

kaj detalajn enketojn kaj esploradojn, vaste funkciigis kursojn de la penso de Maŭ Zedong por plene mobilizi la revoluciajn amasojn, forte kondukis la laboron de batalo, kritiko kaj reformo en la teatra trupo kaj batalakiris unu venkon post alia. En la daŭro de duonjaro post la enveno de la taĉmento al la teatra trupo okazis videblaj ŝanĝiĝoj en diversaj flankoj. La teatra trupo multe prezentis revoluciajn modernajn teatraĵojn, komplete forĵetis en la historian rubujon la nigrajn feŭdismajn, kapitalismajn kaj reviziismajn teatraĵojn. Hju Hiuĝi konstante diris al la aktoroj: “Iri sur scenejon egalas iri sur batakampon. Ni prezentas teatraĵojn ĝuste por defendi la proletaran revolucion artan kaj literaturan linion de Prezidanto Maŭ.” Prezenti por la revolucio kaj por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj jam fariĝis firma ĵuro de ĉiuj geaktoroj.

Post la eniro de la laborista propaganda taĉmento en la teatran trupon, staris antaŭ ĝi ja tre komplika kaj peza tasko. Tamen Hju Hiuĝi proponis starigi la sistemon, ke ĉiuj membroj de la taĉmento devas persiste reveni al la fabriko por labori unu tagon en ĉiu semajno, tute egale, kiel ajn okupita li estas. Iuj prezentis nemalmultajn malfacilojn por tion plenumi. Sed Hju

Hiuĝi firme diris: “Se ni laboristoj longe forlasus fizikan laboron kaj niajn klasajn gefratojn en la ŝpinteksejo, ekŝanĝiĝos al ni la penso kaj sento kun la paso de la tempo. Kaj tio kondukos nin sur la danĝeran vojon de disiĝo de laboro kaj de amasoj.” La malmultaj sed signifoplenaj vortoj de Hju Hiuĝi profunde pensigis la membrojn de la tuta taĉmento. Fine, ĉiuj esprimis unuanime, ke oni nepre efektivigu firme la sistemon. Hju Hiuĝi estas membro de la revolucia komitato de la ŝpinteksejo. Kiam ŝi revenas al la ŝpinteksejo por partopreni kunvenojn de la revolucia komitato, oni ofte trovas ŝin ne en la kunsidejo antaŭ la fiksita tempo de la kunveno, sed antaŭ maŝinoj en la laborejo. Ŝanĝiĝis la pozicio de Hju Hiuĝi, sed neniom ŝanĝiĝis ŝia naturo de laborulo. Veteranaj laboristoj diris: “Ni la maljuna generacio povas esti tute trankvilaj, kiam ni havas por ni tiajn posteulojn kia ŝi.”

Ĝuste tiamaniere Hju Hiuĝi rigore postulas de si mem laŭ la kvin kondiĉoj por esti daŭrigantoj de la afero de la proletara revolucio, elmetitaj de Prezidanto Maŭ, sin hardas kaj pene transformas sian subjektivan mondon kaj la objektivan mondon, kaj tiel ŝi konstante progresas en la batalo.

Kun Arda Entuziasmo Renkonte al la Naŭa Kongreso de la Partio



Laboristinoj bonvenigas la Naŭan Kongreson kun siaj novaj sukcesoj en kreiva studo kaj kreiva apliko de la penso de Maŭ Zedong.




最高指示
工人階級是領導一切

喜報

當地的工人階級在黨的領導下，在毛主席的指示下，取得了輝煌的勝利。這是一篇關於工人階級在黨領導下取得輝煌勝利的喜報。文章詳細描述了工人階級在生產和建設中的貢獻，以及黨對他們的領導和支持。文章強調了工人階級在社會主義建設中的核心地位，並呼籲全體工人團結一致，為實現社會主義和共產主義的偉大事業而努力奮鬥。文章最後以對未來的展望和對黨的讚揚告終。

胡繩 原稿 韓曉 小報
一九五九年一月二十八日



La brilegaj sunradioj de la penso de Mai Zedong prilumas nian tutan patrolandon. Kun arda revolucia entuziasmo la laborista klaso de nia lando estas kreanta pli brilajn fruktojn por omaĝi ilin al la Naŭa Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio.

Marŝas laborista kolono por anonci siajn novajn atingojn.

Juna teksistino Hju Hiugi.



Kun ruĝa koro senlime fidela al Prezidanto Maŭ, revoluciaj laboristoj de prestinktura fabriko zorge kreas desegnon kun grandaj floroj por ĝin omaĝi al la Naŭa Kongreso.



Revolucia gvidanta kadro, reprezentanto de PLA laboranta en la fabriko kaj revolucia laboristo kune pristudas renovigon por doni omaĝon al la Naŭa Kongreso.



MAŬ ZEDONG

Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio

(Esperanta Eldono)

La marksism-leninisma dokumento kun epokfara signifo *Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio*, farita de Prezidanto Maŭ je la 5-a de marto, 1949, estis republikigita je la 25-a de novembro, 1968. Samtempe kun tio, la *Popola Ĵurnalo*, la gazeto *Ruĝa Flago* kaj la ĵurnalo *Liberiga Armeo* publikigis la ĉefartikolon *Serioze Studi la Historion de la Batalo inter la Du Linioj*, kiu komunikis la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ. Nun la pekina Fremdlingva Eldonejo eldonis tiujn du artikolojn en broŝuro.

Ĝi estas eldonita ankaŭ en la lingvoj araba, bengala, birma, angla, franca, germana, hindia, indonezia, itala, japana, korea, laosa, mongola, portugala, persa, rusa, hispana, ŝahilia, urdua kaj vjetnama.

Distribuas: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), Pekino, Ĉinio
Havebla ĉe lokaj librovendejoj aŭ rekte ĉe Sekcio por Poŝta Mendo, Guozi Shudian,
P. O. Kesto 399, Pekino, Ĉinio

Granda Ŝanĝiĝo de Sovaĝa

Rivervalo Ebenaĵo

L IANGHE-brigado de Henanĝaj-komunumo en Mijun-gubernio, Pekino, havas 3,085 muojn da agroj, el kiuj la plejparto dislokiĝas apud rivervalo ebenaĵo longa je 4 kilometroj. La grundo estas el maldika tavolo da sablotero, kaj la rivervalo ebenaĵo estas plena de ŝtonetoj. Ĉar tie sufiĉe serioza estis la malutilo de vento kaj sablo, tial en pasinteco la produkta kvanto de greno estis tre malalta. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ “**Malriĉeco igas aspiri al ŝanĝo, entreprenado kaj revolucio**”, la vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Lianghe-brigado plantis sur la 4 kilometrojn longa sovaĝa rivervalo ebenaĵo ĉirkaŭ milionon da diversspecaj arboj post kelkvara peniga batalado kaj konkero de multaj obstakloj. Meznombro ĉiu komunumano de la brigado havas ĉirkaŭ 1,000 arbojn. Ili ŝanĝis la sovaĝan ebenaĵon en densan arbaron, kaj tiel multe reduktis la malutilon de vento kaj sablo kaj forte stimulis la disvolviĝon de agrikultura produkto. En la jaro 1961, la pomua produkta kvanto de greno de tiu ĉi brigado estis pli ol 190 ĝinoj kaj ĝi duobligis jam en 1965. En 1968, kvankam okazis serioza sekeco malofta en pasintaj dekoj da jaroj, tamen la pomua produktkvanto ankoraŭ superis 400 ĝinojn. La malriĉa fizionomio estas ĝisfunde ŝanĝita. Multaj kadroj kaj komunumanoj, kiuj vizitis tiun ĉi brigadon, laŭdis: Sub la ora brilo de la penso de Maŭ Zedong, la sovaĝa ebenaĵo fariĝis verda maro kaj la malriĉa vilaĝo — riĉa vilaĝo.

Dum transformado de la sovaĝa ebenaĵo, Lianghe-brigado trapasis tre komplikajn kaj intensajn batalojn inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj. De post la Liberiĝo, aktive respondante al la alvoko de Prezidanto Maŭ, tieaj kampanoj suriris iom post iom la vojon de kolek-

tivigo kaj decidis ŝanĝi sian malriĉan fizionomion. Sed, pro la malhelpado de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, sub la protektado de plenmano da potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la malnova partia komitato de la gubernio, iu preterlase nedeterminita kulako sukcesis uzurpi la potencon de la brigado. Li energie kolportis la nigran kontraŭrevolucion reviziisman varon de Liu Ŝaŭki, vane provante restarigi kapitalismon, kaj tute ne zorgis pri transformo de la sovaĝa ebenaĵo, tiel ke la disvolviĝo de agrikultura produkto estis serioze influita. En 1961, kiam la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj forpelis la malbonulon kaj deprenis la potencon de la brigado, tuj komenciĝis la militiro kontraŭ la sovaĝa ebenaĵo.

De kie do komenci? Pri tio la kadroj interkonsiliĝis kun la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj. Kaj tuj en nur unu jaro 1961, ili agrigis 120 muojn da sovaĝa ebenaĵo por planti rizon. Sed pro la atakoj de ventoj kaj sablo, oni eĉ ne povis reakiri la semojn en aŭtuno. La plenmano da potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la malnova partia komitato de la gubernio kaj la malnova partia komitato de la komunumo tuj venis kaj kritikis: “Vi nur sciis fuŝi. Tion oni ja devas lasi al individuoj. Tiamaniere, vi ne estus foruzintaj regulan labortempon, nek alfrontus la nunan malagrablajn.” Profitante la okazon, ankaŭ plenmano da klasaj malamikoj en la vilaĝo ekaktivis, dissemante malicajn parolojn. Kaj la vilaĝo tuj dronis en ĥaoson. Ĉu lasi la aferon al individuoj aŭ persisti ĉe kolektiva mastrumado? La vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj serioze studis la instruon de Prezi-

danto Maŭ **“La pozicion de la kamparo nepre okupos kapitalismo, se socialismo ĝin ne okupos”**, kaj ekkomprenis, ke tio estas serioza batalo inter la du vojoj kaj du linioj. Ili iris al la kadroj kaj diris emfaze kun granda zorgemo: “Lasi la aferon al individuoj estas reiro al individua mas-trumado, kaj kontraŭ tio ni nepre devas rezisti!”

“Ni nepre devas rezisti!” Ĉiuj ĉi tiuj vortoj falis sur la komuniston Ŝan Deŝan, la tiutempan brigadestron (la nunan ĉefkomitatanon de la revolucia komitato de la brigado), kun pezo de mil ĝinoj. Li pensis en si: En la malnova socio mi estis malriĉa knabo almozpetanta. Dank’ al la gvidado de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio, ni mizeruloj liberiĝis el sub la jugo. Nun mi fariĝis kadro, kaj mi nepre devas bone uzi la potencon por la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj sekvi la vojon montritan de Prezidanto Maŭ. La kadroj resumis kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj la lecionon de malvenko en rizplantado kaj post pluaj enketo kaj esplorado decidis multe planti arbojn sur la sovaĝa ebenaĵo por bari ventojn, senmovigi sablon kaj reformi la grundon.

Por sukcese vivigi la arbaron unue necesis ĉirkaŭfermi la ebenaĵon. Aŭdinte tion, plenumano da klasaj malamikoj en la brigado tuj provis subfosi la planon per ĉiuj metodoj, ĉie disklaĉante: “Postenigi gardostarantojn eĉ por ĉifona riverebenaĵo! Ĉu la ŝtonoj tieaj povus forkuri?” Vizaĝe al la furioza atako de la klasaj malamikoj, elpaŝis kuraĝe la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj dirante: “Ni ja ĝuste devas fermi la ebenaĵon por ŝanĝi nian malriĉan fizionomion kaj konstrui socialismon.” Ili sukcese fermis la ebenaĵon kaj plantis 120 muojn da salikoj en tiu jaro.

Estis efektive malfacile planti arbojn en la ŝtonoza ebenaĵo, en iuj lokoj por fosi unu kavon oni bezonis unu labortagon. Sed la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj komprenis, ke tio estas ne nur batalo por transformi la naturon, sed ankaŭ intensa batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj, batalo politika por persisti en la socialisma direkto. Kun la ruĝa fidela koro al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la vastaj amasoj de komunumanoj kaj la revoluciaj kadroj decideme antaŭenmarŝis renkonte al la malfaciloj!

En la printempo de 1963, disvolviĝis ankoraŭ pli grandskala batalo de militiro kontraŭ la sovaĝa

ebenaĵo. Kun la spirito de montotranslokigo de la Malsaĝa Avo, la grandnombraj kadroj kaj komunumanoj fosis kavojn ĉiutage senĉese. Multaj pioĉoj de la komunumanoj estis senpintigitaj, sed ili ankoraŭ persiste laboradis. El la fosita tero de ĉiu kavo pli ol du trionoj estis ŝtonoj. Pro manko de tero oni ne povis planti arbojn. Ili do alportis teron per ĉaroj aŭ vektoj de sur la bordoj por meti ĝin en la kavojn. La komunumanoj laboradis tage kaj ankaŭ nokte. Ankaŭ multaj maljunuloj kaj lernejoj knaboj meminciate ĵetis sin en la bataladon por transformi la ebenaĵon. Dum tiu periodo, la pli ol 70-jara malriĉkamparano Liu Denggaŭ laboris tage kaj ankaŭ meminciate partoprenis senpagan laboron en nokto. Li diris: “Tio estas konstruado de socialismo kaj kreado de feliĉo por niaj filoj kaj nepoj de senfinaj generacioj. Mi ja nepre devas ĝin partopreni.” Kaj sole en tiu printempo, dank’ al unuanima kunlaborado, la kadroj kaj komunumanoj plantis sur la ebenaĵo pli ol 20,000 poplojn kaj salikojn, el kiuj pli ol 80% estis enradikiĝintaj.

La venko kuraĝigis la kadrojn kaj komunumanojn de Lianghe-brigado kaj plifirmigis ilian fidon por kuraĝe batali kaj kuraĝe venki. Tiujare, ĉie sur la ebenaĵo kaj la deklivoj estis plantitaj sume pli ol 100,000 arboj. Ĝuste kiam Lianghe-brigado troviĝis en la alta tajdo de militiro kontraŭ la sovaĝa ebenaĵo, Prezidanto Maŭ faris la grandan alvokon **“Lerni de Daĝaj en agrikulturo”**. Informiĝinte pri tio, la kadroj kaj komunumanoj de Lianghe-brigado tuj ekagis. En komparo kun la progresintaj agadoj de Daĝaj, ili serioze klopodis trovi la distancon de sia postlasinteco malantaŭ Daĝaj kaj ellaboris novan planon por transformi la sovaĝan ebenaĵon. Sub la kuraĝigo de revolucia spirito de Daĝaj ili daŭrigis la transformadon senrompe jaro post jaro. En vintro kiam ili ne povis fosi, ili elprenis la ŝtonojn. Somere, kiam la tagoj estis longaj, ili faris sturmajn laborojn ĉiutage post vespermanĝo. Ili persiste batalis laŭte legante foje kaj refoje la vortojn de Prezidanto Maŭ **“Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon.”** La suno estis varma, sed ne tiom, kiom la ruĝaj koroj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kiuj firme sekvas Prezidanton Maŭ. La malfacilo estis granda, sed ne tiom, kiom ilia decidemo en transformado de la sovaĝa ebenaĵo kaj irado sur la socialisma vojo. Ekde 1964 ĝis la komenco de 1966, la komunumanoj plantis plie sur la river-

EKSPOZICIO DE ĈINAJ MODERNAJ PORCELANAĴOJ KAJ FAJENCOJ EN OSLO

Ekspozicio de ĉinaj modernaj porcelanaĵoj kaj fajencoj okazigita kune de la Ĉina Ambasadorejo en Norvegio kaj la Norvega-ĉina Amikeca Asocio funkciis du semajnojn en Oslo dum februaro kaj estis varme laŭdita de norvegaj vizitantoj.

En la ekspozicio montritaj estis pli ol 160 grupoj kaj unuoj da porcelanaj kaj fajencaj artaĵoj. Tiuj ekspozitaĵoj reliefigis la senliman amon de la ĉina popolo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la entuziasman prikantadon pri la granda proletara kultura revolucio de Ĉinio. Multaj norvegaj vizitantoj alte taksis tiun ĉi ekspozicion. Precipe la grupo da ekspozitaĵoj *Farmpaga Kolektejo* donis al ili profundan impreson. Kelkaj progresemaj junuloj diris: “Tiu ĉi grupo da artaĵoj faras al la popolo tre bonan lecionon pri la klasbatalo.”

ALTPRECIZA NOVTipa FROTUM- ILMAŜINO POR SPIRALAJ DENTRAD-TRANĈILOJ

Sub la lumo de la penso de Maŭ Zedong la laborista amaso de la Ŝanhaja Fabriko de Instrumentoj disvolvis la revolucion spiriton kuraĝi pensi kaj agi kaj sukcese fabrikis novan maŝinon — altprecizan novtipan frotum-ilmaŝinon por prilabori precizajn spiralaĵojn dentrad-tranĉilojn.

Altpreciza dentrad-tranĉilo estas nemankebla ilo por fabriki precizajn maŝinojn. Tiu ĉi nova maŝino, kiun la Ŝanhaja Fabriko de Instrumentoj fabrikis, estas de aparte nova strukturo, facile manipulebla kaj havas altan labor-efikon. La precizeco de la dentradaj tranĉiloj faritaj per ĝi superas tiun de la tranĉilo de sama speco, kiun la okcidenta burĝaro laŭdas kiel la unuaklasan en la mondo. Sed ĝia produktokosto egalas nur dudekonon de tiu de tia maŝino importita. Nun tiu ĉi novtipa frotum-ilmaŝino jam estas produktata en granda kvanto.

vala ebenaĵo kun longeco de 4 kilometroj pli ol 400,000 poplojn, salikojn, soforojn kaj kaŝtanojn. Kaj samtempe estis kreskigitaj 300 muoj da fragmitoj. Krome la komunumanoj faris fragmitajn matojn kaj diversajn malgrandajn agrikulturajn ilojn utiligante sovaĝajn arbobranĉojn kaj fragmitojn, kreskantajn sur la ebenaĵo. Tiel ili malfermis novan vojon por flanka produktado. En la lastaj du jaroj, la brigado konstruis pumpstacion kaj aĉetis 16 brutojn kaj diversajn agrikulturajn maŝinojn kaj instrumentojn per la mono akirita per la flanka produktado. Tio forte subtenis la agrikulturan produkton. Sed la plenmano da potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la malnova partia komitato de la gubernio kaj la malnova partia komitato de la komunumo ne forlasis sian intencon kaj ankoraŭ volis malhelpi Lianghe-brigadon en la irado de la vojo de Daĝaj. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Lianghe-brigado tion rimarkis per la okuloj kaj gravuris la malamon en la koron. Ili diris: “Prezidanto Maŭ ligiĝas kun ni koro kun koro, kaj li alvokas nin lerni de Daĝaj. Tion ni definitive plenumos kaj la vojon de Daĝaj ni definitive iros!”

En la granda proletara kultura revolucio, kune kun la vasta proletara revoluciaro de la tuta gubernio, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, revoluciaj amasoj kaj revoluciaj kadroj de Lianghe-brigado brave leviĝis por ribeli kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki kaj kontraŭ la plenmano da potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la malnova partia komitato de la gubernio kaj malnova partia komitato de la komunumo, deprenis de ili la potencon kaj firme tenis ĝin ĉe si. Spertinte la akran batalon inter la du linioj, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ekhavis pli profundan komprenon pri la instrukcio de Prezidanto Maŭ “**Lerni de Daĝaj en agrikulturo**” kaj ankaŭ la direkto de antaŭirado fariĝis por ili pli klara. Kaj dum la pli ol du jaroj de la granda proletara kultura revolucio ili akiris pli grandan venkon en batalo por transformi la sovaĝan ebenaĵon.

La vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, revoluciaj amasoj kaj revoluciaj kadroj de Lianghe-brigado profunde komprenis, ke la venko en transformado de la sovaĝa ebenaĵo estas granda venko de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong kaj rezulto de serioza plenumado de la instrukcioj de Prezidanto Maŭ.

Post Kiam Malriĉkamparanoj kaj

Malsuperaj Mezkamparanoj Ekadministris

Komercon en la Kamparo

EN la granda alttajo de la batalo, kritiko kaj reformo, ĉie aperas senĉese novaj revoluciaj aferoj. Unu inter ili estas la administrado de komerco en nia kamparo fare de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ĉi-sube ni raportos al niaj legantoj kelkajn novajn aferojn okazintajn post kiam la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Angiabaŭ-komunumo de Vankjuan-gubernio, Hebej-provinco, ekadministris la komercon.

AVINO HU DUFOJE VENIS AL LA VENDEJO

Iutage la nova vendisto de Hinjantun-a Vendstacio Ĝaŭ Joŭlin portis fenestran paperon al la 83-jara malriĉkamparano avino Hu en la vilaĝo. Enirinte ŝian domon, li tuj helpis la avinon alglui la paperon sur la fenestron kaj samtempe rakontis al ŝi novajn ŝanĝiĝojn okazintajn en la vendstacio, post kiam la komerco estas administrata de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ju pli la avino aŭskultis, des pli ŝi sentis ĝojon en sia koro. Kaj ŝi ne povis ne rememori iun okazintaĵon:

Iun tagmezon antaŭ tri jaroj, avino Hu volis aĉeti alkalon pulvoron por fari vaporitan maizaĵon, kaj iris mem kun helpo de irbastono al la vendejo, ĉar forestis tiam ŝia eta nepino. Alveninte apenaŭ al la pordo de la vendejo, ŝi estis repuŝita de la malvarma diro de iu vendisto: “Ni jam finis nun la deĵoron!” Kaj la pordo estis tuj fermita knare antaŭ ŝia nazo. Avino Hu ne nur ne akiris alkalon, sed male estis plene regalita per malagrablo. De tiam ŝi neniam plu volis iri al la vendejo.

En la granda proletara kultura revolucio, solviĝis la multjara enigmo en la koro de avino Hu. Estis ja la kontraŭrevolucia reviziisma linio, antaŭenpuŝita de la granda renegato, granda interna spiono kaj granda laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, kiu misgvidis la menson de la vendistoj tiel ke ili ne povis bone servi al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Nun, informite pri la ŝanĝiĝo de la vendejo, okazinta post kiam la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ĝin ekadministris, avino Hu ne povis endormiĝi tutnokte dezirante refoje viziti la vendejon por propraokule ĝin vidi.

La sekvintan tagon, ellitiĝinte avino Hu tuj venis al la vendstacio kun helpo de irbastono. Malgranda Ĝaŭ rapide aliris por subteni la maljunulinon. Unue li entuziasme propagandis al ŝi la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ “**Serioze kaj bone konduki batalon, kritikon kaj reformon**”, kaj poste diris: “Vi jam estas tiom grandaĝa, avino, pro kio vi ankoraŭ alvenas? Se vi ion bezonas, vi nur diru, mi jam portos ĝin al via domo!” Kun rideto, avino Hu diris ĝoje: “Via avino nun bezonas nenion. Mi venas nur por vidi, kiel aspektas nun nia vendejo.” Unue, ŝi rigardis la agrikulturajn instrumentojn, kiuj ĉiuj estas tute laŭ bezonoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Poste ŝi rigardis la ŝtofojn. Estis porlaborvestaj nankenoj kaj indigokoloraj kaj diversspecaj katunoj, kiuj estis malluksaj kaj solidaj. La verkoj de Prezidanto Maŭ kaj *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* ore brilis sur la bretoj. Ju pli avino Hu rigardis, des pli ŝi ĝojis. Turnante sin al la portreto de Prezidanto Maŭ pendanta meze sur la funda muro de la vendejo, ŝi ĝojkriis en la korfundo kun brilantaj

larmoj en la okuloj: "Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu longe Prezidanto Maŭ!"

PORTI VARKORBON POR LA POPOLO

Inter la amasoj de Longĉigoŭ-brigado de Angiabaŭ-komunumo cirkulas rakonto pri la emociaj agoj de la vendisto Du Venming de la vendstacio, kiu tutkore kaj tutanime servas al la popolo.

Post kiam la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ekadministris komercon en la kamparo, oni elektis Du Venming, intelektan junulon revenintan al la hejmvilaĝo, kiel ĝian vendiston. Je la komenco, kun alta entuziasmo, malgranda Du tuttage vizitis malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn de domo al domo kun varkorbo sur la dorso por porti al ili bezonaĵojn. Sed, nelonge poste, lia entuziasmo subite vaporiĝis. Post enketo, la olda malriĉkamparano avo Vang, kiu respondecas pri la administrado de komerco, informiĝis, ke ekde la administrado de komerco fare de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, la klasaj malamikoj malamas tion ĝisoste kaj malice diras ke "la vendisto iras de domo al domo kvazaŭ almozulo!" Pro sia nealta konscio pri linia batalo, aŭdinte tion, ankaŭ malgranda Du eksentis, ke tuttaga rondirado ne estas io deca. Eksciinte la radikon de la problemo, avo Vang decidis eduki malgrandan Du per la penso de Maŭ Zedong por ke tiu servu al la popolo tutkore kaj tutanime, kaj per tio frakasi la intrigon de la klasaj malamikoj.

Je la sama vespero, kun salika korbo en la mano avo Vang venis al la vendstacio. Malgranda Du supozis ke avo Vang venas por ion aĉeti, kaj distreme demandis: "Kion vi volas, avo?" "Nenion." "Ĉu vi do venas por kontroli la varojn?" Intime frapetante la ŝultron de malgranda Du, avo Vang diris: "Mi venas ĉifoje ja por kontroli la penson!" Samtempe li elprenis el sia poŝo la ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*. Sub la lamplumo ili kune ekstudis la instruon de Prezidanto Maŭ "Nepre ne forgesu la klasbatalon" kaj poste avo Vang diris: "Ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj nun administras la komercon, pro tio la klasaj malamikoj furiozas de kolero kaj ŝtele diraĉas ke porti varojn de domo al domo similas al almozpeto! Ĉu tio ne estas evidenta subfoso al la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ!" Levante sian korbon avo Vang daŭrigis: "Kun tiu korbo mi maljunulo siatempe almozpetis, kaj en ĝi estas portataj la sango kaj

larmoj de ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Nun mi donacas ĝin al vi, kaj vi nepre memoru ĉiam ke la portado de varkorbo estas por firmigi kaj disvolvi la socialisman ekonomion kaj konstrui komunismon!" Malgranda Du kortuŝite akceptis la korbon.

Depost tiam, kun varma espero de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj senlima fideleco al Prezidanto Maŭ, malgranda Du funkcias kaj kiel vendisto kaj kiel propagandisto de la penso de Maŭ Zedong, li pensas kaj zorgas kion pensas kaj zorgas la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Iuvespere, norda vento hurlis, malgranda Du pensis en si: "Fenestra papero estas facile difektebla de la furioza vento, kiom bezonas nun fenestran paperon malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj!" Li do prenis sian varkorbon por porti al ili fenestran paperon. Ĝuste tiam, kiam la malriĉkamparano onklino Ĉeng en embaraso pro ŝiriĝo de sia fenestra papero, malgranda Du portis al ŝi la urĝe bezonatan paperon. Onklino Ĉeng kortuŝite diris: "Vi ja estas vere antaŭvidema, malgranda Du, kiel vi scias ke mia fenestra papero difektiĝis?" Kun senlime profunda sento malgranda Du diris: "Ne mi estas antaŭvidema, sed la vortoj de nia amata Prezidanto Maŭ estas la plej antaŭvidemaj!"

BONE PESI EĈ ANTAŬ ELSPEZO DE UNU CENDO

Estis profunda nokto. En la vendstacio de Diĉitun-brigado aŭdiĝis sonoj de tintado. Kio okazis tie?

Post kiam malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ekadministris la vendejon, por plibonigi la servadon al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, estas necese pliigi kelkajn var-bretarojn. Oni ekdiskutis tion ĉirkaŭ vendtablo. Iu diris: "Tio estas facile solvebla: Bonan lignon nia brigado ja havas, el kiu ni faru bretarojn kaj poste ŝmiru ilin per ruĝa lako. Ili certe estos bele dekoraciitaj". Sed multaj aliaj malkonsentis tian proponon kaj opiniis: "La vendejo administrata de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj absolute ne devas pensi pri lukseco. Sufiĉas jam ke oni ilin faru el malnovaj, uzitaj tabuloj!"

Dum la diskutado, revenis de iu kunveno la maljuna malriĉkamparano Baj Kijue, estro de la administra grupo de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj pri la vendejo. Aŭd-

inte la diversajn opiniojn, maljuna Baj pensis en si: “Fari bretarojn el nova ligno aŭ utiligi la uzitan koncernas la grandan problemon, kian linion praktikas kaj kian tradicion konservas la vendejo sub la administrado de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.” Sekve li organizis ĉiujn kune studi la grandajn instruojn de Prezidanto Maŭ: “**Plie ŝparu en fardo de revolucio**” kaj “**Diligenteco kaj ŝparemo devas esti praktikataj en mastrumado de fabrikoj, de magazenoj**”, kaj kompari la pasintan amaron kun la nuna feliĉo. Li diris: En la malnova socio, ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj estis subpremataj kaj ekspluatataj de bienuloj, ni havis nek manĝon nek veston, por ne paroli pri lukseco kaj pompeco. Nun, Prezidanto Maŭ asignis al ni

malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj la taskon de administrado de la komerco, kaj ni devas bone pesi eĉ antaŭ elspezo de unu cendo sed ne devas forgesi nian devenon!” La vortoj de maljuna Baj lumigis ĉies koron. Ĉiuj ekkomprenis ke nur konservi kaj disvolvi la laborstilon de penado en malfacilaj kondiĉoj ebligas pli bone praktiki la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ. Ili tuj elserĉis eluzitajn lignokestojn kaj malnovajn najlojn. Iuj segis tabulojn, aliaj najlis, kaj ili finis la laboron tuj en la nokto.

La sekvintan matenon, kiam la ruĝa suno levigis en la oriento, ĝi lumigis la Diĉitun-an vendstacion. Sur la nove faritaj var-bretaroj, pendis la portretoj kaj vortoj de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Ĉiuj ĝojis en la koro.

Propaganda Taĉmento de la Penso de Maŭ Zedong el Ruĝaj Maljunulinoj

EN Caŭĝuang-brigado, Dongfeng-komunumo, Hinhe-gubernio, Hebej-provinco, aktivadas propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong, kiu konsistas el 16 maljunulinoj el la familioj de martiroj kaj armeanoj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ili estas meznombre 60-jaraj. En la malnova socio, ĉiuj iliaj familioj estis saturitaj de granda amaro kaj profunda malamo, kaj ekspluatataj de bienuloj kaj kulakoj. En la granda proletara kultura revolucio, ili meminiacie organizis propagandan taĉmenton de la penso de Maŭ Zedong kaj fervore propagandas la penson de Maŭ Zedong. Pro

tio la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj intime nomas ilian taĉmenton Propaganda Taĉmento de la Penso de Maŭ Zedong el Ruĝaj Maljunulinoj.

**“LA PENSO DE MAŬ ZEDONG ESTAS
NIA VIVRADIKO”**

“La penso de Maŭ Zedong estas nia vivradiko. Ĉiutage ni studas la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj kantas la kantojn el la vortoj de Prezidanto Maŭ; ju pli ni studas, des pli ruĝiĝas niaj koroj kaj ju pli ni kantas, des pli akriĝas niaj okuloj.”

“Kiu subtenas Prezidanton Maŭ, kun tiu ni intimiĝas; kiu oponas Prezidanton Maŭ, kontraŭ tiu ni luktas.” Jen estas la komunaj sloganoj de la Propaganda Taĉmento de la Penso de Maŭ Zedong el Ruĝaj Maljunulinoj en batalado. Tiuj maljunulinoj multe suferintaj en la malnova socio prenas studon de la penso de Maŭ Zedong kiel la ĉefan taskon de la propaganda taĉmento. Pro sia nescipovo legi, ili petas instruadon de aliaj en frua mateno kaj malfrua nokto.



60-jara avino Vang Huajue, estrino de la propaganda taĉmento kaj familiano de la armeano, ellernis la kanton *Ruĝas la Oriento* en pli ol dudek tagoj. Dum sia lernado de la vortoj de Prezidanto Maŭ “Nepre ne forgesu la klasbatalon”, 64-jara avino de la familio de armeano Ĝang Hjuehua ripetade petis instruadon de sia filo kaj pene memoris ilin vorton post vorto. Ŝi diris: “Ni ne devas mismemori la vortojn de Prezidanto Maŭ eĉ je unu vorto!” Kaj fine ŝi firme gravuris en sian koron tiujn vortojn de Prezidanto Maŭ.

*Eldiris ĉiufraze kion en nia koro.
Vigligu ni gardemon de la revolucio,
Ĝisfine do batalos kontraŭ la malamiko.*

.....

La ruĝaj maljunulinoj ne nur mem persistas en studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ, sed ankaŭ decidas armi pli multe da homoj per la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong. Ĉiam kiam aŭdiĝas ĉiu el la plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ, ili ĝin pene memoras, kaj post tio ili tuj faras propagandon sur stratoj kaj stratetoj kaj de familio al familio.

Por pli efike propagandi la penson de Maŭ Zedong, la ruĝaj maljunulinoj ankoraŭ prezentas kulturajn kaj artajn programerojn. La 1-an de novembro de la pasinta jaro, la ruĝa radio disaŭdigis la komunikon de la Plivastigita 12-a Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio. Tio tre ĝojigis la ruĝajn maljunulinojn, kaj en la sama nokto ili mem verkis kaj prokludis programerojn por fari propagandon poste inter amasoj. Ili kantis:

*Vizaĝe al la suno ekfloras la sunfloro,
Alflugas ĝojigaĵo kun l' orienta vento,
Publikigita estas la ruĝa komuniko,
Popol' de l' tuta lando ĝojegas el la koro.
Orbrilas ĉiu vorto de l' ruĝa komuniko,*

De unu jaro, en propagandado de la penso de Maŭ Zedong la ruĝaj maljunulinoj plenumis “kvar neprajn irojn”, nome, kie la revolucio kaj produkto akiris novan sukceson, tien ili nepre iris por akلامي la grandan venkon de la penso de Maŭ Zedong; kie komplikas la klasbatalo, tien ili nepre iris portante la penson de Maŭ Zedong, la akran armilon; kie la amaso estas ne bone mobilizita, tien ili nepre iris por ĝin mobilizi per la penso de Maŭ Zedong; kie svarmas homoj, tien ili nepre iris por okupi la pozicion per la penso de Maŭ Zedong. Dum pli ol unu jaro, ili mem verkis kaj prezentis pli ol 30 programerojn, faris pli ol 600-fojajn prezentadojn en 40-50 brigadoj, kaj iliaj spektatoroj atingis cent kelkdek mil personojn.

**“NI NEPRE NE DEVAS FORGESI
LA KLASBATALON”**

Ĉiam sin armante per la instruoj de Prezidanto Maŭ pri la klasoj kaj klasbatalo, la ruĝaj maljunulinoj de la propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong aktive partoprenas diver-

sajn kritikajn kunvenojn, forte kritikis la nigrajn varojn de la kontraŭrevolucia reviziismo disvastigitajn de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kiaj "teorio pri estingiĝo de klasbatalo", "ekspluato estas merito", "tri pliigoj kaj unu fikso", "kvar liberoj" k. a., kaj faris decideman batalon kontraŭ la plenmano da klasaj malamikoj en sia brigado.

Iun vesperon, avino Ĝang Hjuehua studis la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ: **"La granda proletara kultura revolucio estas esence granda politika revolucio de la proletaro kontraŭ la burĝaro kaj ĉiuj ekspluataj klasoj sub la kondiĉoj de socialismo, estas daŭrigo de la longdaŭra batalado inter la Komunista Partio de Ĉinio kaj la de ĝi gvidataj vastaj revoluciaj popolamasoj en unu flanko, kaj la kuomintanga reakciularo en la alia flanko, estas daŭrigo de la klasa batalo inter la proletaro kaj la burĝaro."** La instruo de Prezidanto Maŭ memorigis ŝin pri iu samvilaĝano, kiu donis informon al la malamiko kaj forrabis grenon de la Okavoja Armeo en la jaroj de la Kontraŭjapana Rezistmilito. Frumatene de la sekvinta tago ŝi malkaŝis tiun aferon en la propaganda taĉmento de la ruĝaj maljunulinoj. La propaganda taĉmento tuj fondis kurson de la penso de Maŭ Zedong, kaj en ĝi ĉiuj membroj studis la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ, sin armis per la penso de Maŭ Zedong kaj malkaŝis unu post alia diversajn krimojn de tiu, kiu donis informojn al la malamiko, ke li subfosis la Kontraŭjapanan Rezistmiliton, subfosis agrikulturan kooperigon kaj popolan komunumigon kaj subfosis la grandan proletaran kulturalan revolucion. Post tio ili informis la malkaŝitajn problemojn al la brigado. Tra multfoja esplorado oni konstatis ke tiu estas renegato kapitulacinta al la japanaj diabloj. Do kune kun la amasoj la ruĝaj maljunulinoj eltiris tiun ĉi renegaton kaj multfoje faris batalojn kaj kritikojn kontraŭ li.

Dank' al aktiva partopreno en batalo kontraŭ la malamikoj kaj en la revolucia amasa kritiko, ja pli akriĝis la okuloj de la ruĝaj maljunulinoj en la hardado de klasbatalo kaj batalo inter la du linioj, ili pli klare komprenis, kio estas proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, kaj kio estas la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki. Tial ili ĉiam faras kritikon al tio kio ne konformas al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj faras batalon kontraŭ klasaj malamikoj,

kiam ili rimarkis ke la lastaj estas ne obeemaj. Ili diris: "Ni nepre ne devas forgesi la klasbatalon. Se ni forgesos ĝin, la regpotenco de ni laboranta popolo ne povos esti firme tenata."

"HELPI KADROJN BONE TENI REGPOTENCON ESTAS NIA PROPRA DEVO"

En februaro de la pasinta jaro, en Caŭĝuang-brigado fondiĝis revolucia gvidanta grupo kun triflanka kombiniĝo. Sub la bonega situacio, ĉe iuj novaj kadroj troviĝis malstreĉiteco, kaj iuj maljunaj kadroj ne kuraĝis preni sur sin respondecon. Rimarkinte tion la ruĝaj maljunulinoj tre maltrankviliĝis en sia koro. En la kurso de la penso de Maŭ Zedong ili ree kune studis la instruon de Prezidanto Maŭ: **"Ĉiuj revoluciaj bataloj en la mondo estas por depreni regpotencon kaj ĝin firmigi."** Ili diris: "Iuj kadroj ankoraŭ ne plene komprenas la grandegan signifon pri bona tenado de regpotenco, ni nepre ne devas ne zorgi pri tio, kaj helpi kadrojn bone teni la regpotencon estas nia propra devo."

La sekvintan tagon avino Ĝang Hjuehua preparis amarmemorigan manĝaĵon kaj invitis kadrojn de la brigado al sia domo. Tie ili manĝis la amarmemorigan manĝaĵon kaj kantis la amarmemorigajn kantojn, kaj poste, ŝi ekrakontis al ili pri la pasintaj heroaĵoj kiel brave vivoferis ŝia onklo kaj kiel kripliĝis ŝia frato grave vundite en la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj kiel ŝia unua filo perdis unu gambon pro bombo de Kuomintangano en la Liberiga Milito, k.a. Avino Ĝang diris: "Por kio la sennombraj martiroj brave oferis sian vivon en la pasinteco? Por liberigo de la malriĉaj amasoj tra la lando! Nia nuna regpotenco estas akirita per la sango kaj vivo de la martiroj! Knaboj, nun ni havas regpotencon kaj ni devas ĝin bone teni, alie, ni vanigos ilian esperon!" Post la amarrememorigo de avino Ĝang ĉiuj kune studis la instruon de Prezidanto Maŭ: **"Miloj post miloj da martiroj antaŭ ni heroe oferis sian vivon por la interesoj de la popolo. Ni alte tenu ilian standardon kaj marŝu antaŭen laŭ la vojo surverŝita de ilia sango!"** Viŝante larmojn membro de la gvidanta grupo Vang Jongnian diris: "Regpotenco estas radika problemo de la revolucio. Kun la regpotenco la proletaro kaj malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj havas ĉion; sen ĝi ili do perdos ĉion. Ni nepre bone tenos la regpotencon por la popolo."

Tutkore por la Kolektivo

— Pri la komunumanoj Ĝang Gingŝeng kaj Ŝaŭ Ĝongking kiuj redonis trovitan monon

EN Funing-gubernio, Hebej-provinco, vaste cirkulas la rakonto pri la kortuŝa agado redoni trovitan monon fare de Ĝang Gingŝeng kaj Ŝaŭ Ĝongking, komunumanoj de Donghenan-brigado de Bohaj-komunumo.

Iu-antaŭtagmeze, Ĝang Gingŝeng kaj Ŝaŭ Ĝongking kondukis ĉevalĉarojn unu post la alia por aĉeti lignon. Sur la vojo, ili jen kantis la revolucion kanton *Marnavigado Dependas de la Stiristo*, jen ĝoje interparolis pri la bonega situacio de la kultura revolucio kun ĉiam pli granda gajeco. Proksime al la vilaĝo Vanggeĝuang, la antaŭiranta Ŝaŭ Ĝongking subite trovis sur la vojo katunan saketon kube plenigitan. Li tuj deĉariĝis kaj levis ĝin. Kiam ili malfermis la saketon, ili ekmiris vidinte ligaĵojn da novaj bankbiletoj, 2-juanaj, 5-juanaj kaj 10-juanaj. Maltrankvile ili rigardis ĉiudirekten por trovi la perdinton. Sed troviĝis neniu. Montrante la monsaketon Ĝang Gingŝeng diris al Ŝaŭ Ĝongking: “Jen tiom multe da mono. Ĝi certe estas de kolektivo por urĝa afero. Se ni ne rapide trovos la perdinton ĉiurimede, eble grava afero pro tio estos fuŝita.” “Prave”, diris Ŝaŭ Ĝongking, “unue ni donu la monon al la brigado kaj poste ni serĉu la perdinton!”

Kiom granda estis la trovita sumo, sciis tiam nur la perdinto Teng Ĝengong, oficisto de la Kredita Kooperativo de Zaŭjuan-komunumo, kiu iris tiutage al la banko por preni la kolektivitan monon. La ricevitaĵojn 9,000 juanojn li metis en la saketon, kiun li pendigis sur la direktilon de la biciklo. Kiam li revenis al la kredita kooperativo kaj enportis la biciklon tra la pordo, li trovis,

ke malaperis jam la monsaketo. Tiam lia kapo plene ŝvitis pro maltrankvilego kaj tuj sciigis telefone la koncernajn instituciojn pri la afero. Aŭdinte la informon, ankaŭ la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de najbaraj vilaĝoj tre zorgis pri tiu ĉi afero, kaj multaj el ili venis por helpi Teng Ĝengong serĉi la perditan monon laŭ la vojo. Tiam ankaŭ kamaradoj Ĝang Gingŝeng kaj Ŝaŭ Ĝongking, kiuj trovis la grandan sumon, ege maltrankviliĝis por la perdinto kaj povis nur urĝe rapidi al la oficejo de la brigado, kunportante la grandan sumon. Aŭdinte ilian raporton, la kadroj, kiuj tie kunvenas, ĉiuj estis tre kortuŝitaj kaj tuj sciigis telefone la aferon al la komunumo. Post raportado de unu ŝtupo al alia, fine sciigis, ke la granda sumo estis perdita de kamarado Teng Ĝengong, oficisto de la Kredita Kooperativo de Zaŭjuan-komunumo. Tiam jam estis post la oka horo vespere. Sed pensante pri la instruo de Prezidanto Maŭ servi al la popolo “ekskluzive” kaj “senrezerve”, Ĝang Gingŝeng kaj Ŝaŭ Ĝongking tuj iris rekte al Zaŭjuan-komunumo kun la trovita mono, en akompano de kadroj de la brigado kaj la komunumo.

Kiam Teng Ĝengong, la perdinto de la mono, ricevis la 9,000 juanojn el la manoj de la du nekonatoj, li estis tiom emociita, ke li ne sciis kion diri. Rigardante la portreton de Prezidanto Maŭ sur la muro, li ne povis deteni siajn larmojn kaj, levinte siajn du brakojn, kriis kun kortuŝiĝo: “Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu longe Prezidanto Maŭ!” Por lerni de kamaradoj Ĝang Gingŝeng kaj Ŝaŭ Ĝongking, Zaŭjuan-komunumo tuj okazigis kunsidon. En la kunsido la reprezentantoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkam-

paranoj de la komunumo esprimis, ke ili firme lernos de kamaradoj Ĝang Gingseng kaj Ŝaŭ Ĝongking, kiuj kreive studas kaj kreive aplikas la penson de Maŭ Zedong kaj havas la komunisman spiriton redoni trovitan monon kaj dediĉi sian tutan koron al la kolektivo. En la nomo de ĉiuj revoluciaj kadroj kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Zaŭjuan-komunumo, la respondecaj kamaradoj de la komunumo donacis po kompletan de *Elektitaj Verkoj de*

Maŭ Zedong al Ĝang Gingseng kaj Ŝaŭ Ĝongking. Akceptinte la revoluciajn trezorajn librojn, la lastaj diris kun emocio: “Ke ni hodiaŭ povis fari ion farendan por la popolo, la merito devas esti atribuita al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, al la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong. De nun ni pli bone klopodos por kreive studi kaj kreive aplikati la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj penos plej energie en aplikado de ĉio studita por fariĝi liaj bonaj komunumanoj.”

Li Ricevis la Duan Vivon

SUB la gvido de la laborista kaj PLA-a propagandaj taĉmentoj de la penso de Maŭ Zedong laborantaj en la hospitalo kaj dank’ al la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, la revoluciaj kuracaj laborantoj de Hinhua-hospitalo dependa de la Dua Medicina Instituto de Ŝanhajo sukcese revivigis klasan fraton, kiu estis frapita de alttensia elektro kaj kies koro ĉesis bati jam 23 minutojn, kaj per tio kreis miraklon en la medicina historio.

NEPRE REVIVIGI LA KLASAN FRATON

Ĝoŭ Deming, laboristo de la konstrua taĉmento sub la Buroo de Malpezaj Industrioj de Ŝanhajo, ĉiam staras en la plej antaŭa vico dum “**tenado de la revolucio kaj stimulado de la produkto**” sur laborkampo de socialisma konstruado. Posttagmeze de la 13-a de decembro 1968, por almeti ŝtaltangojn li grimpis sur la ŝupron de trietaĝa domo alta je 20 metroj kontraŭ frosta vento kaj kontinua pluveto. Kiam li levis la lastan ŝtaltangon por almeti ĝin al la tegmento, li ne rimarkis ke la fino de la stango ektuŝis alttensian elektran draton de 6,600 v. kaj li estis malfeliĉe frapita de la elektro. Alia maljuna majstro sur la loko sin ĵetis antaŭen por fortiri Ĝoŭ Deming de la elektrodrato, sed la forta elektra

kurento reĵetis lin sur la betonan terason. En la sama tempo ankaŭ Ĝoŭ jam disiĝis de la elektra fonto kaj falis de sur la supro de la domo. Dum sia falado li unue estis malhelpita de la skafaldo kaj poste de arbobranĉoj malsupre kaj fine falis sur sabloamason ĉe stratrando.

La ĉeestantaj laboristoj rapide portis lin al la kuracĉambro de la fabriko. La kuracaj laborantoj palpis lian pulson: la pulso mankis; aŭskultis lian koron: la koro ĉesis bati; ekzamenis lian spiron: la spiro haltis. Ili malfermis lian okulon kaj konstatis ke la pupilo jam disvastiĝis. Ĉiuj ĉi tiuj simptomoj montris ke Ĝoŭ Deming troviĝas jam en stato de morto. La kuracaj laborantoj tuj faris al li artan spiradon sed ne ricevis rezulton; kaj ankaŭ injekto de stimulilo por spirado trovis nenian reakcion. Ili do rapide sendis Ĝoŭ Deming al Hinhua-hospitalo ĉe proksimeco por urĝa savo.

Kiam Ĝoŭ Deming estis portita en la kuracĉambron por urĝaj malsanoj, lia koro jam ĉesis bati plenajn 18 minutojn.

Post ekzameno la deĵoranta kuracisto ne povis ne eksenti surpriziĝon en si. Li pensis ke fremdlanda medicina gazeto asertis, ke ses minutojn



Kamaradoj de la laborista kaj PLA-a propagandaj taĉmentoj de la penso de Maŭ Zedong en la hospitalo vizitas Ĝoŭ Deming kuŝantan en la malsanulĉambro kaj kune kun li prikantas la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ kaj la grandan venkon de la penso de Maŭ Zedong.

post la ĉeso de korbato forestas jam espero pri reviviĝo. Tiam longe jam ĉesis bati la koro de tiu kamarado laboristo, ĉu estas ankoraŭ ia ebleco lin revivigi? Ĝuste kiam li hezitis, li vidis ke la kamaradoj el la laborista kaj PLA-a propagandaj taĉmentoj de la penso de Maŭ Zedong jam aplombe staras apude kaj direktas al li kuraĝigan rigardon. Tiumomente li ekmemoris la grandan instruon de Prezidanto Maŭ servi al la popolo “**ekskluzive**” kaj “**senrezerve**” kaj trovis por si grandan kuraĝigon. Li do decidis fari ĉion por savi Ĝoŭ Deming!

Komenciĝis jam intensa batalo por savi la vivon de la klasa frato.

La revoluciaj kuracaj laborantoj de la 11 fakoj de la hospitalo konkure alvenis post informiĝo pri la afero por oferi sian forton en strikta kunlaborado. Sub la plenforta apogo de la revoluciaj kuracaj laborantoj de la tuta hospitalo, la deĵoranta kuracisto kun alta fido faris mem eksterbrustan kormasaĝon por la paciento kaj samtempe petis flegistojn fari por tiu artan spiradon. La tempo pasis sekundo post sekundo kaj minuto post minuto, tamen nenia reakcio montriĝis ĉe la paciento.

Ĝuste en tiu kriza momento, la kamaradoj de la laborista kaj PLA-a propagandaj taĉmentoj de

la penso de Maŭ Zedong laŭte legis por la kuracaj laborantoj en la ĉambro la vortojn de Prezidanto Maŭ: “**Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon.**” La instruo de Prezidanto Maŭ kuraĝigis la revoluciajn kuracajn laborantojn. Post mallonga interkonsiliĝo, ili decidis, laŭ la aktuala stato de Ĝoŭ Deming, kuraĝe rompi la rutinan limigon de la burĝaro kaj injekti al la paciento adrenalinon. Tiu medikamento estas emfaze malpermesita de la malnova “lernolibro” por uzi ĉe kazo de elektra frapo, ĉar la medikamento kvankam havas fortan efikon por stimuli la kuntiriĝon de la koro, tamen ĝi povas ankaŭ kaŭzi fibretajn tremetojn al la koro de la paciento kaj tiel venigi kompletan morton. Ili pensis ke ili povos uzi tremforigan aparaton ĉe tiu ĉi okazo kaj fari masaĝon post sekco de la brusto por daŭrigi la savadon.

Dank’ al la firma gvidado de la laborista klaso kaj la saĝeco de revolucia amaso, tuj aperis miraklo post la injekto de adrenalino: la koro de kamarado Ĝoŭ Deming rekomencis bati unuafoje post 23-minuta interrompo kaj post ankoraŭ kvin minutoj rekomenciĝis lia unua spiro. Ĝoŭ Deming estis revivigita!

Aŭdinte tion la revoluciaj amasoj, kiuj ĉiam garde atendis ekster la ĉambro, saltis de ĝojego kaj

portis la ĝojigan informon al la konstruejo, laŭte kriante: "Vivu Prezidanto Maŭ!"

KOMANDI LA BATALON PER LA PENSO DE MAŬ ZEDONG

Kvankam la korbato kaj spirado de Ĝoŭ Deming rekomenciĝis, tamen li ankoraŭ troviĝis en serioza sveno, lia spirado ne estis normala kaj liaj membroj senĉese konvulsiis.

Laŭ la t. n. sperto de burĝaraj "specialistoj" kaj "aŭtoritatuloj", post manko de oksigeno en la cerbo je pli ol 7-8 minutoj la ĉeloj de cerbaj nervoj estas detruitaj neresanigeble; kaj la paciento fariĝos "idioto" eĉ revivigite. Ĉu Ĝoŭ Deming povos resaniĝi post manko de oksigeno en sia cerbo je pli ol 23 minutoj? Analizinte kaj esplorinte la malsanon de Ĝoŭ Deming per la penso de Maŭ Zedong, la revoluciaj kuracaj laborantoj opiniis, ke eblas al li resaniĝo, se oni rapide alprenas ĉiujn necesajn kaj efikajn rimedojn. Por gajni tempon ili, rompinte la malnovajn rutinojn, tuj aplikis glacian ĉapon, dehidradon kaj aliajn rimedojn antaŭ ol sendi la pacieron al malsanula ĉambro por preventi kaj malgravigi eventualan cerban hidropsion pro longtempa manko de oksigeno en la cerbo de Ĝoŭ Deming kaj doni bonan bazon por posta savlaboro.

Kiam la revoluciaj kuracaj laborantoj de Hinhua-hospitalo diskutis plue por ellabori projekton por kuraci Ĝoŭ Deming, estis prezentita propono sendi lin por esti kuracata en la dependa hospitalo de iu milita medicina kolegio en Ŝanhajo, kiu havas altpreman ĉambron. La kamaradoj de la laborista propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong firme subtenis tiun proponon. Tiam la hospitalo tuj organizis savgrupon, kiu estis sub la gvido de la laborista propaganda taĉmento kaj kun la kunagado de la PLA-a propaganda taĉmento kaj partopreno de ok junaj kuracaj laborantoj. La savgrupo rapide sendis Ĝoŭ Deming al la alia nomita hospitalo. La kamaradoj de tiu hospitalo aktive kunhelpis por savi la pacieron kun profunda proletara sento.

Dum la kuracado en la altprema ĉambro, la savgrupo firme persistis en uzado de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong por komandi ĉion kaj direkti la batalon de la komenco ĝis la fino.

Post eniro en la altpreman ĉambron, la kamaradoj de la laborista propaganda taĉmento gvidis ĉiujn kune studi la instruon de Prezidanto Maŭ pri "ekstreme respondecema sento al la laboro kaj ekstreme varma koro al kamaradoj kaj la popolo"

kaj instigis ilin sinĵeti en la savlaboron kun tiu instruo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Kiam en la ĉambro la aerpremo leviĝis iom post iom ĝis tri atmosferoj, la malsano de Ĝoŭ Deming subite ekhavis novan turniĝon: ree plivastiĝis liaj pupiloj, senĉese falis lia sangpremo, kaj ekaperis la antaŭmorta simptomo — duopa enspiro. Tuj ekregis en la ĉambro streĉiteco. Senprokraste, de ekster la ĉambro, la kamaradoj de la laborista propaganda taĉmento alsendis telefone la plej altan instrukcion: "Tio kion ni bezonas, estas entuziasma sed trankvila spiritstato kaj intensa sed bonordema laboro." La instruo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ donis neelĉerpeblan forton al la kuracaj laborantoj. Ili aplombe analizis la malsanstaton kaj konsideris eventualan aperon de akompana malsano post rebato de la koro. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ pri kupto de la ĉefa kontraŭdiro, ili opiniis ke la ĉefa kontraŭdiro estas nun la manko de oksigeno en la cerbo kaj cerba hidropso. Kontraŭ tio ili aplikis al Ĝoŭ Deming medikamenton, kiu havas plej bonan efikon kaj kies flankefiko estas evitebla per taŭga kontraŭrimedo, kaj daŭre malaltigis la temperaturon de la paciento. Fine ili sukcesis preventi la tuj aperontan danĝeron.

Post la obstina batalado de la kuracaj laborantoj kaj energia kunlaboro en la savado fare de koncernaj institucioj, Ĝoŭ Deming plene rekonsciiĝis fine post 63-hora svenado! Post 75 horoj, li malfermis siajn okulojn kaj vidis la portreton de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ sur la muro de la ĉambro. Kun senkompare emociita sento, li ekkriis la unuan frazon post la ricevo de la dua vivo: "Vivu Prezidanto Maŭ! longe vivu Prezidanto Maŭ!"

Post 9-tagnokta kuracado, Ĝoŭ Deming iom post iom reakiris sian mensan kapablon kaj lia sanstato rapide pliboniĝis. Al ĉiuj vizitantoj li diras ĉiam kun grandega emocio: "Tiu kiu donis al mi la duan vivon, estas Prezidanto Maŭ. Mi nepre pli bone studos la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskultos liajn vortojn, agos laŭ liaj instrukcioj, kaj por ĉiam sekvos lin dum revoluciado!"

La sukcesa savo de kamarado Ĝoŭ Deming estas la unua ĝojinda paŝo sur la vojo al servado al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, farita de la revoluciaj kuracaj laborantoj de Hinhua-hospitalo sub la gvido de la laborista kaj PLA-a propagandaj taĉmentoj de la penso de Maŭ Zedong, kaj venko de la batalo, kritiko kaj reformo en la hospitalo sub la gvido de la laborista klaso!

Ruĝa Signal-lanterno

Kolektive adaptita de la Ĉina Pekin-opera Trupo



SCENO 6

LUKTO KONTRAŬ HATOJAMA ĈE LA FESTENO

La sekvinta nokto.

La domo de Hatojama.

Leviĝas la kurteno en ĝazo. Sur la tablo estas aranĝita luksa festeno. Post la latisfenestro brilegas lampoj, kaj dancas dancistinoj.

Hatojama fumas starante kun mano sur la apogilo de seĝo.

Envenas Hoŭ Hianpu.

Hoŭ: Raporton! Li Juhe alportita.

Hatojama: Bonvenigon!

Foriras Hoŭ.

Interne: "Bonvolu eniri, majstro Li!"

Nun ekbrilegas la lampoj. Envenas Li Juhe. Li haltas, faras ĉirkaŭrigardon kaj intence fumas.

Hatojama: Ha, malnova amiko, estas feliĉe vidi vin denove! Kiel vi fartas!

Li: Kiel vi fartas, sinjoro Hatojama?

Hatojama proksimiĝas al Li por manpremi kun li, sed Li Juhe ignoras lin. Kun embaraso Hatojama retiras sian manon.

Hatojama: Ha, kiel malfacile ni renkontiĝas denove! Ĉu vi rememoras ankoraŭ, kiam ni laboris sur la rusa fervojo en Harbin...

Li: Ho? Tiam, vi estis riĉa japana doktoro dum mi ĉina malriĉa laboristo. Ni estis irantaj, kiel "trajnoj sur du trakoj", ne la saman vojon!

Hatojama (*nerekte*): Ej, ne, ne, ne, mi estis doktoro dum vi laboristo, en tio estas nur diferenco de profesioj! Certa amikeco ja ekzistas inter ni. Unuvorte, ni estas malnovaj amikoj, sed ne fremduloj, ĉu ne?

Li: Se tiel estas, do favoru min per via prizorgo!

Hatojama: Ĝuste pro tio mi invitas vin ĉi tien por sate babilo. Do sidiĝu, sidiĝu. (*Ili sidiĝas.*)

Hodiaŭ estas mia naskiĝtago, amiko, tempo de privata festeno. Ni babilu nur pri amikeco, sed ne politiko, ĉu bone?

Li: Mi estas malriĉa laboristo, kaj ne scias kio estas politiko. Vi povas diri kion vi volas!

Hatojama: Bone, mi ŝatas vian malkaŝemon. Venu do. (*Li verŝas vinon.*) Pokalo da sengusta vino ne taŭgas por esprimi mian respekton al vi. Nu, amiko, trinku. (*Li levas la pokalon.*)

Li: Vi ja estas tro ĝentila, sinjoro Hatojama. Sed pardonon, mi jam abstinis pri alkoholaĵo. (*Li forŝovas la pokalon sur la tablo.*)

Hatojama: Se vi ne volas fari komplezon, mi do ne kuraĝas ĝeni vin. (*Li trinkas sole kaj ankoraŭ daŭrigas sian ofensivon.*) Ej, kial preni aferojn tiel serioze? Estas malnova ĉina diro, ke la homa vivo estas kvazaŭ songo, ĝi forpasas kiel palpebrumo. Ĝuste kiel oni diras: "Ni devas kanti trinkante vinon, ja kiom longas la homa vivo?"

Li: Jes, ĝui muzikon kaj rigardi dancojn ja vere estas vivo de feoj. Sinjoro Hatojama, mi deziras al vi tian ĝuon en ĉiutago kaj longan vivon!

Hatojama (*malsukcesinte jam en la komenca batalo, li vole nevole sin retiras*): Ho, dankon al vi, dankon al vi.

Li (*sentante la rivalon en ridinda embaraso*): Vi estas tro ceremoniema, tro ceremoniema! Hm, hm, hm...

Hatojama: Ha, ha... (*farante premon*) Amiko, mi kredas budaismon. La sutro diras: "Fronte mar' maldolĉa sin etendas, kaj returne bord' atendas!"

Li (*humure*): Mi ne kredas budaismon, mi tamen aŭdis alian diron: "Diablo unu futon saltas, sed Dio je dekobloj altas."

Hatojama: Bone! (*Vole nevole defensiva*) Bone vi diris. Sed ĉiu el la diroj estas nur speco de kredo. En fakto, la plej altan kredon oni povas resumigi per du vortoj.

Li: Du vortoj? Kio estas ili?

Hatojama: "Por mi."

Li: Ho, "por vi"?

Hatojama: Ne! "Por si mem."

Li: "Por si mem."

Hatojama: Jes.

Li: Ha...

Hatojama: Malnova amiko! "La Di' detruas homon kiu ne agas por si mem!"

Li: Ho? Se oni ne agas por si mem, lin eĉ la "Di' detruas"?

Hatojama: Jes, tio estas la ŝlosilo de la socia vivo.

Li: Ho! Eĉ la socia vivo havas ŝlosilon?

Hatojama: Ja ĉiu afero havas sian ŝlosilon.

Li: Ha, sinjoro Hatojama, via ŝlosilo estas tamen tro malfacile komprenebla por homo kia mi. Ha...

Hatojama: *Sondebla malfacile estas ja ĉi tiu homo! Ne povas li distingi vere bonon de malbono. Jen plurajn palpotuŝojn li aŭdacis tuj repuŝi; Kaj tiel flato kiel laŭdo lin ne povis tuŝi! Mi, mi, mi ... mi ankoraŭ paciencon plu preferos,*

Je sperto mi ja riĉas, rimedmankon ne suferos, Ni vidu, ĉu li fine l' ĉifrolibron ne liveros.

Ni ĉesu la ĉirkaŭiran ludon, amiko, mi petas vin helpi.

Li (*kun ŝajnigita miro*): Mi estas malriĉa laboristo, pri kio mi povus vin helpi?

Hatojama (*senpacience*): Lasu la ŝercon. Donu al mi la objekton!

Li: Kion?

Hatojama (*malvarme*): La ĉifrolibron!

Li: Ha, ha, ha! Kio estas tio? Mi scipovas nur manipuli komutilon, sed neniam ludis tion.

Hatojama (*abrupte stariĝas*): Se vi volas trinki ne vinon honorigan sed punan, amiko, do ne riproĉu min se mi kondutos krude!

Li: Faru laŭ via plaĉo!

Hatojama frapas sian pokalon per manĝbastoneto. Envenas Vang Liangju plene armita en uniformo, kun medalo sur la brusto.

Hatojama: Rigardu, mia malnova amiko, kiu estas tiu ĉi?

Vang: Liĉjo...

Li: Fermu vian buŝaĉon!

Vang: Ne estu tro rigida, Liĉjo....

Li: Vi senhonta renegato!

Ho, vi senhonta besto, perfidulo-renegato, Pro timo al la mort' preferas vi kapitulacion! Kaj pri la malamika utiligo kaj minaco Mi ja vin atentigis zorge kaj en ripetado. Al la revoluci' vi ĵuris per ĝismort-fidelo, Sed nun komplikas por la malamiko por ficelo. Vi al la malamiko kiel hundon vin forvendas. Kaj vian hontindaĵon kiel gloron vi rigardas. Nun levu vian kapon kaj min rekte ekrigardu. Senspina vi sklavaĉo, ĉu vi honton ne eksentas?

Hatojama mansvingas, kaj Vang forglitas en embaraso.

Hatojama: Ne koleru, amiko, sidiĝu, sidiĝu. Ha ... amiko, ne ekscitiĝu. Mi ja ne volus elmeti tiun ĉi atuton, sed ĉar vi puŝis min al senelirejo, mi do povis fari nenion alian ol tion!

Li: Ha, ha ... mi antaŭsciis ke vi tion faros! Via atuto ja estas nur skabia hundaĉo kun rompita spino. Sinjoro Hatojama, mi do ne povas kontentigi vin!

Hatojama: Mi ... tamen povas kontentigi vin! Bone, amiko, ni sidiĝu kaj marĉandu!

Li: Marĉandu?

Hatojama: Jes, jen estas bona negoco!

Li: Negoco?

Hatojama: Jes, negoco! Mi tre komprenas vin, ke vi komunistoj estas plej zorgaj pri la kredo. Laŭ mi, la tiel nomata kredo estas nur speco de negoco! Negocante oni kompreneble devas akiri profiton!

Li: Ha ... ja simpla estas la afero. Se nur vi povas akiri profiton, vi do povas ĉion vendi kiel ĉifonon!

Hatojama (*furiozas pro kolero*): Vi ... (*ne povante paroli momente*) Vi tro senbridas! Amiko, certe vi konas mian okupon. Mi estas homo, kiu speciale okupiĝas pri dono de pasporto al irantoj al la infero!

Li: Vi ankoraŭ ne konas mian okupon. Mi estas homo, kiu ricevis pasporton speciale por detruai vian inferon!

Hatojama: Vi devas scii, ke mia krurotordilo neniam abstinis je homa karno!

Li: Tion mi jam delonge spertis!

Hatojama (*subigite de lia braveco, li tamen montras simpation*): Prenu mian konsilon, amiko, kaj frue returniĝu, por ke viaj ostoj ne disrompiĝu.

Li: Mi preferas disrompiĝon de la ostoj ol returniĝon!

Hatojama: Senkompataj estas la torturiloj de la ĝendarma taĉmento. Sindeteno de ili signifas vivon kaj aliro al ili signifas morton.

Li: La komunistoj havas feran volon, kaj rigardas morton kiel hejmeniron!

Hatojama: Eĉ se vi havus feran buŝon kaj ŝtalvoilon, mi tamen devigos vin fari konfesan parolon!

Li: Eĉ se vi havas tranĉilmonton kaj glavobarbaron, mi povas ja vanigi vian vantesperon! Hatojama!

*Japana militaristaĉo kun lupkaraktero,
Per ridmiĝo kovras ja denaskan la kruelon.
Invadas vi patrion nian kaj l' popolon buĉas,
Kaj pri prospero kuna de Azio primurmuras.
Popolon en leviĝo gvidas nia kompartio;
Centmilionoj bravaj sinoferas pro l' nacio.
Vi revas venki per la perfidula koluzio,
Sed kiel elakvig' de l' lun', ĝi restos fantazio.*

Hatojama: Gardistoj!

Do oni ekkonigu al vi mian krur-tordilon.

Envenas la kaporalo kaj du japanaj ĝendarmoj.

Li: Ha, ha, ha, ha

Ĝi ja plenumos ĝuste mian gimnastik-deziron.

Kaporalo: Iru!

La du japanaj ĝendarmoj kuras al Li Juhe por lin tiri.

Li: Mi ne bezonas vian servon! (Li aplombe prenas sian ĉapon, forblovas la polvon sur ĝi, plurfoje ĝin frapetas, kaj paŝas for kun levita kapo.)

Lin sekvas la kaporalo kaj la du ĝendarmoj.

Hatojama (tre malpacience paŝante tien kaj reen, gratante jen la orelojn jen la vangojn, krias ripete): Ja frenezuloj estas la komunistoj! Ja frenezuloj! ...

*Ho, pro kolero la okuloj miaj
nebuliĝas, kaj la kapo ŝvelri-
gidas,*

*Altiĝis eĉ la sangopremo kaj la
manoj fridas.*

*Ja ankaŭ l' komunistoj estas
homaj idoj ordinaraj,
Sed kial ili malmolegas pli ol
pecoj ŝtalaj!*

*Damninde, li mortspitas por la
ĉifrolibron kaŝe teni,
Do, kion trafos mi, se mi ne
povos ĝin transpreni!*

Abrupte eksonoras la telefono.

Hatojama (prenas la ricevilon):

Halo, Hatojama parolas. Jes, sinjoro komandanto, ni jam

trovis certan spuron ... Trankviliĝu, Hatojama volas garantii la sukceson per la kapo. Jes, jes, jes.

Envenas la kaporalo.

Kaporalo: Raporton.

Hatojama: Nu kiel?

Kaporalo: Ni jam uzis ĉiujn torturilojn, sed Li Juhe preferas morti ol konfesi.

Hatojama: Preferas morti ol konfesi?!

Kaporalo: Mi iru kun kelkaj homoj al lia domo por traserĉi ankoraŭfoje, via estra moŝto?

Hatojama: Lasu. Laŭ mia sperto, eĉ dekmil homoj ne povas trovi kion komunisto kaŝis. Enportu lin.

Kaporalo: Alportu Li Juhe!

Du japanaj ĝendarmoj enpuŝas Li Juhe. Kun sangmakuloj kaj vundoj sur la tuta korpo Li staras firme.

Li: *Bandito Hatojama, ulaĉ' kun lupa koro!*

Hatojama: La ĉifrolibron! Donu al mi la ĉifrolibron!

Li: Hatojama!

*Per ĉia torturil' vi turmentis min kruele;
Sed mi nur dentkunpremīs je l' karnoŝirdoloro,
Ja estas neeblafo submeti min laŭcele!
Ha ...*

Ruĝa lumo prilumas Li Juhe, kaj verda lumo prilumas Hatojama.

—La kurteno falas.
(Daŭrigota)



Batalo sur Fuvan-monto

EN la lasta tagdeko de decembro de 1968 la Laosa Popola Liberiga Armeo, la armitaj fortoj de la laosaj patriotaj neŭtralaj fortoj kaj la milica gerila taĉmento lanĉis surprizan atakon kontraŭ la bandita trupo de Vangbaŭ, kiu okupis kiel sian neston Fuvan-monton en Xieng-Khoung, kaj en la brile farita batalo okupis tie ĉiujn apogpunktojn de la malamiko, inkluzive ĝian aerodromon.

Fuvan-monto, kiu situas ĉe la limo inter la provincoj Xieng-Khoung kaj Luang Prabang, estas loko strategie tre grava kaj terforme tre danĝera.

La bandita bataliono de Vangbaŭ okupis tri montpintojn kiel apogpunktojn, kie la banditoj starigis siajn defendajn konstruaĵojn utiligante la danĝeran terformon: fortikajn fuortojn, striktan kaj densan pikildratan barilon kaj du tranĉeojn antaŭ kaj post ĝi kiel obstakloj. Eĉ per tio ili ankoraŭ ne estis trankvilaj kaj plie per mono kaj materio subaĉetis kaj armis iujn apudloĝantojn kiel siajn eksterajn gardantojn. Tiam la banditaro de Vangbaŭ plene certigis al si, ke nun ili povas esti liberaj de danĝero. Tial, ili fanfaronis, ke la apogpunkto sur Fuvan-monto estas de neniuj ajn konkerebla.

Matene je la 6-a horo de la 29-a ekiris la armitaj trupoj de la du nomitaj patriotaj fortoj kaj la milica gerila taĉmento. Kun forta patriotismo kaj ĝisosta malamo kontraŭ la malamiko, timante nek malfacilojn nek danĝerojn, ili marŝis trans montoj kaj riveroj dum la tuta tago kaj fine atingis la celokon je la 6-a horo posttagmeze.

Estis informite post rekognosko, ke sur la ĉefa montpinto de Fuvan sidas la bandita komandejo. La patriotaj armitaj trupoj decidis preni ĝin kiel la ĉefan punkton de atako. La unua defendlinio de la malamiko estis tranĉeo tri metrojn larĝa kaj pli ol du metrojn profunda, en kiu estis plene starigitaj bambuaj pikiloj. Post ĝi estis densa kaj seninterrompa barilo pikildrata, kaj plej interne estis alia tranĉeo. La patriotaj armeanoj kaj popolanoj decidis unue elsendi eksplodigan grupon el tri personoj por breĉi la pikildratan barilon, kaj ke la aliaj sin kaŝu en la tranĉeo por eltiri la bambuajn pikilojn kaj pretigu eskalojn kaj tabulojn.

La unua provo de eksplodigo estis rimarkita de la malamiko, kiu tuj pafis per mi-


traloj, kaj ne sukcesis. Tamen, la mitraloj de la malamiko ne povis timigi la heroajn batalantojn, kiuj ĵuris nepre plenumi la taskon kaj konkeri la malamikan apogpunkton por liberigi la suferantajn samlandanojn. Fine estis decidite, ke plotonestro Kan Hiang kaj subplotonestro Si Ta plenumu la taskon breĉi la pikildratan barilon kaj eksplodigi la fuorton.

Portante la esperon de ĉiuj siaj batalamikoj kaj samlandanoj, ili firme kaj kuraĝe sin direktis al la plejfronto de la lukto. Tuj post kiam la pikildrata barilo estis breĉita, Kan Hiang spite ĉion ĵetis du dinamitpakojn en la fuorton de la malamiko, "bum!" la fuorto estis eksplodigita.

La eksplodo sonis kiel ordono. La malantaŭe embuskantaj patriotaj armeanoj kaj popolanoj tuj saltis el la tranĉeo, sternis tabulojn kaj almetis eskalojn. Kaj en batalkriado ili surprize atakis la malamikojn, tiel ke la lastaj senprezare falis en konsternon kaj panikon aŭ estis mortigitaj aŭ fuĝintaj. La patriotaj armeanoj kaj popolanoj militakiris la tutan armilaron kaj municion de la malamiko.

Post mallonga arda lukto, la laosaj patriotaj armeanoj kaj popolanoj premis sub siajn piedojn la de la malamiko fanfaronitan "nekonkereblan" "mitan" monton kaj faris tie jubiladon pri triumfo.

Sub helpo de la Laosa Popola Liberiga Armeo la laosa gerila taĉmento de milicanoj sin ekzercas en pafado.





Embuska Atako

GE TIANMING

IUN tagon de aprilo, 1935, sub la gvido de Prezidanto Maŭ nia Ĉina Laborista-kamparana Ruĝa Armeo venke atingis la urbeton Laŭmukong, kiu situas ĉe la bordo de Vugiang-rivero, Gujĝoŭ-provinco.

Laŭmukong estas malgranda urbeto kun ĉirkaŭ cent familioj. Ni decidis tie ripozi unu tagon. Sed nelonge post la alveno ni ricevis informon de rekognoska trupo ke nordoriente troviĝas kuomintangaj banditoj, kies nombron oni ankoraŭ ne klare sciis. Do nia trupo retiriĝis al la sudo je pli ol 20 lioj for de Laŭmukong por tie sin kaŝi kaj daŭre rekognoskis.

Post la rekognoskado ni pli klare informiĝis pri la stato de la malamiko: Tri regimentoj de la trupo de gujĝoŭ-a militaristo Joŭ Guocaj nun sin direktas al sudokcidento por persekuti nian alian trupon. Ĉar la malamikoj ne trovis nian trupon en Laŭmukong, ili nun daŭre moviĝas al nia embuskejo.

Apenaŭ ni forpuŝis ĉefajn fortojn de la renkonte veninta malamika trupo, la postkurantaj malamikoj venis antaŭ nin. Kion fari ĉe tiu momento? Bati aŭ ne? Post esploro la partia komitato de korpuso opiniis, ke la granda nombro da malamikoj jam alproksimiĝis al nia trupo; se ni ne batos ilin, ni do lasos ilin daŭre postkuri nin, estos malfacile eviti la malamikojn por nia trupo, kiu militiris en pluraj sinsekvaj tagoj. Nur se ni elektos la malfortan parton de la malamiko por ĝin frakasi, ni povos laŭvole agadi. Krome ni havas favoran kondiĉon por venki. Kvankam nia trupo ne okupas superecon en nombro, tamen ni havos eblon ekstermi ĝian parton, se ni koncentros fortojn, serĉos ŝancon de batalo kaj atakos ĝian unu punk-

ton. Pli grava estas tio, ke nia batalo ludas rolon de rekta kunago kun la ĉefaj fortoj de la Ruĝa Armeo, kiuj marŝas al Junnan-provinco. Sekve, ni tuj faris firman decidon: decideme bati!

Tuj post la decido ni faris aranĝon por batalo. Ĉi tie la terformo estis tre favora, ĉar ambaŭflanke de la vojo estis montetaraj zonoj kun tre densaj bambuoj kaj arbustoj altaj je staturo. Tiu ĉi loko estis bona embuskejo por nia trupo. Laŭ tiu montvojo nia trupo sekrete formis embuskan ringon. Por garantii la venkon de la batalo, ni postenigis unu roton por gardi la malamikan helptrupon. La konkreta batala maniero estis: Ne bati la kapon nek la voston, sed koncentri fortojn por embuski la komandantaron, malordigi ĝian komandan sistemon kaj poste frakasi la tutan trupon.

Tagiĝis. Post profunda politika mobilizado nia trupo senbrue iris en la pozicion kaj sin kaŝis en arbustaroj. Ni finis ĉiujn preparajn laborojn kaj estis pretaj por ekagi ĉe favora okazo. Ni atendis la malamikojn ĝis iom post la oka horo, kaj trovis, ke ili moviĝas al sudokcidento laŭ la vojo, sinpremanante vico post vico. Evidente, la malamikoj intencis rapide kuratingi nin, tial ilia militiro estis kompare urĝema. Ili tute ne atendis, ke ni kaŝis nin tie, kaj eĉ ne faris traserĉadon. Retenante la spiron ni observis kaj kalkulis: pasis unu regimento, du, kaj baldaŭ tri, sed ankoraŭ ne estis videbla la komandantaro. Tio iom malfacienigis nin. Laŭ la rekognoskado ni konstatis ke la malamiko havas nur tri regimentojn, sed nun jam pasis tiom da trupanoj, tamen la komandantaro ankoraŭ ne venis. Ni vole nevole devis pacience atendi.

Kiam ni atendis ĝis iom post la unua horo posttagmeze, ektumultis sur la vojo. La militiraj vicoj de la malamiko pli kaj pli malordiĝis; iuj rajdis sur ĉevaloj, aliaj veturis per palankeno, triaj piediris, kvaraj vektportis . . ., ĉiuj ili iris stumble kaj malstreĉe. Ĝuste tiuj estis nia difinita objekto de la atako.

“Eksturmu!” aŭdiĝis la batalordono. Tuj eksonis salvo da pafoj, kaj la batalantoj saltis el la arbustaroj kaj kriante sturmis al malamikoj. Ĉe tiu ĉi surprizatako la malamikoj tuj falis en panikon kaj disenforkuris, iuj simple surgenuis flanke de la vojo kaj kapitulacis kun levitaj pafiloj.

Post disrompo de la komandantaro de la malamiko, ĉiuj ĝiaj subaj regimentoj perdis komandon. Profitante tiun okazon ni faris fortan sturmon al la malamikoj kaj unuspire persekutis ilin je 5-6 lioj kaj fine disbatis ilin.

Krepuskiĝis. La tuta batalo finiĝis. Ni entute militkaptis pli ol mil fusilojn kaj pli ol 1,800 malamikojn inkluzive du vicregimentestrojn. La militkaptitoj konfesis, ke ĉifoje ili sume havis sep regimentojn kaj intencis strikte postsekvi nian trupon, kaj kune kun la trupo de Ĉiang Kajŝek ĉirkaŭekstermi ĉe la bordo de Vugiang-rivero nian Ruĝan Armeon kiu norden militiris por batali kontraŭ la japanaj agresantoj, sed ili ne atendis, ke ili mem falis en nian embuskon.

La venko de tiu ĉi batalo refoje konvinkis nin pri la grandeco de milita penso de Prezidanto Maŭ, kaj pri tio ke sekvante Prezidanton Maŭ ni povos sukcese atingi la kontraŭjapanan fronton — nordan Ŝenhi-provincon.

LECIONOJ DE ĈINA LINGVO

我們 爱 读 毛 主席 的 书
 Wǒmen ài dú Máo Zhǔxí de Shū
 Ni Amas Legi Maŭ-Prezidanto de Librojn

我 家 有 四 个 人: 爸爸、妈妈、
 Wǒ jiā yǒu sì ge rén: bàba, māma,
 Mia familio havas kvar personojn: patro, patrino,

弟弟 和 我。我 爸爸、妈妈 都
 didi hé wǒ. Wǒ bàba, māma dōu
 frato(malpliaga) kaj mi. Miaj patro, patrino ambaŭ

是 工人。我 在 学校 唸书。我
 shì gōngren. Wǒ zài xuéxiào niànshū. Wǒ
 estas laboristoj. Mi en lernejo legas librojn. Mia

弟弟 今年 两 岁, 他 会 喊:
 didi jīnnián liǎng suì, tā huì hǎn:
 frato ĉi-jare (estas) du-jara, li scipovas krii:

“毛 主席 万岁!”
 „Máo zhǔxí wànsuì!”
 “Maŭ-Prezidanto (vivu)dekmil jarojn!”

每天 晚上 我們 都 学习
 Měitiān wǎnshang, wǒmen dōu xuéxí
 Ĉiutage vespere, ni senescepte studas

毛 主席 語录。我 們 爱 读
 Máo zhǔxí yǔlù. Wǒmen ài dú
 Maŭ-Prezidantajn vortojn. Ni amas legi

毛 主席 的 书。
 Máo zhǔxí de shū.
 Maŭ-Prezidanto de librojn.

TRADUKO

Ni Amas Legi la Verkojn de Prezidanto Maŭ

Mia familio konsistas el kvar personoj: patro, patrino, malpliaga frato kaj mi. Ambaŭ miaj patro kaj patrino estas laboristoj. Mi lernas en lernejo. Mia frato estas dujara ĉi-jare, kaj li scipovas krii: “Vivu Prezidanto Maŭ!”


Ĉiuvespere, ni senescepte studas vortojn de Prezidanto Maŭ. Ni amas legi la verkojn de Prezidanto Maŭ.

KLARIGOJ

1. En “毛主席的书” Máo zhǔxí de shū (la verkoj de Prezidanto Maŭ), la vorto *shū* propre signifas *libro(j)n*, sed ĉi tie ĝi aludas *verko(j)n*.

2. Por formi posesivon en la ĉina lingvo, oni almetas la vorton 的 *de* post substantivo aŭ pronomo, ekzemple: “毛主席的书” Máo zhǔxí de shū. Tamen, oni povas ankaŭ ne almeti ĝin, kiam la posesiveco estas sufiĉe evidenta, ekzemple: “毛主席语录” Máo Zhǔxí Yǔlù (Vortoj de Prezidanto Maŭ), “我家” wǒ jiā (mia familio) kaj “我爸爸” wǒ bàba (mia paĉjo).

3. En “每天” měitiān, la vorto měi signifas *ĉiun* kaj la vorto tiān signifas *tagon* aŭ *ĉielon*. En la teksto, “每天晚上” měitiān wǎnshang havas la signifon: *ĉiuvespere*.



Letero de Sveda Leganto O. K.

Akceptu mian sinceran saluton kaj koran dankon pro la valoraj libroj de nia kara kaj glora Maŭ Zedong. Mi portas ĉie surbruste insignon de Prezidanto Maŭ, kaj la VORTOJ DE PREZIDANTO MAŬ ZEDONG estas en mia poŝo, por ke mi povu legi kaj studi ĝin, kiam mi havas liberan tempon.

La nuntempa plej kompetenta interpretisto de marksism-leninismo estas Maŭ Zedong. Lenin, Stalin kaj Maŭ Zedong — jen triopo, kies instruoj iros de generacio al generacio! Longe vivu Li, la glora instruanto, por ke la mondo povas profiti liajn justajn konsilojn en zigzagaj vojoj de politika vivo. Marksism-leninismen mi trovis ĉe Maŭ Zedong, populare skribitan tiel, ke ordinara laborhomo povas tuj kompreni la tutan enhavon. Lia instruo estas klara kiel diamanto sen ia ajn komplikajo. Mi deziras al vi bonajn fruktojn en via glora kultura revolucio sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, ĉar estas ja nature, ke oni devas frakasi ĉiaspeciajn burĝarajn ideojn, kiuj hantas en la kapoj de iuj. Ja ne povas esti komunisto tiu, kiu samtempe havas en sia kapo filistrajn ideojn. Kiel mi ŝatus esti en Ĉinio kaj vidi tiujn heroajn batalantojn, novtipajn homojn, kiuj

fariĝis veraj komunistoj, la veraj Homoj kun majusklo.

Ĉion bonan mi deziras al via justa afero, kaj se mi estus riĉa, mi skribus nomon de Maŭ Zedong per oraj literoj, sed mi estas malriĉa laboristo, kaj pro tio mi presis Lian nomon sur mia kora tabulo.

Letero de Hispana Leganto G. A.

Mi ricevis vian leteron promesantan sendi al mi la libron *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*. Mi aspire atendadis la alvenon de la sendaĵo, kaj fine mi ricevis ĝin. Tio vere estis malavare, ke vi plenumis miajn dezirojn, ĉar mi ricevis du ekzemplerojn de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* (unu el ili estas en esperanta lingvo kaj la alia — en hispana lingvo kun medalo de Prezidanto Maŭ), kaj mi ricevis ankaŭ la libreton *Pri Popola Milito* kaj kvar aliajn verkojn de Maŭ Zedong, ĉiujn en Esperanto.

Mi ĝoje montris ilin al miaj kolegoj, kaj ĉiuj admiris tiujn libretojn kaj ties enhavon, kiu por ĉiuj estis preskaŭ nekonita ĝis nun.

Mi nun ĉiam portas kun mi unu el la ekzempleroj kaj ŝatas ofte legi kelkajn paragrafojn kaj diskuti la enhavon kun miaj kunuloj.

Kvankam mi legis ankoraŭ nur kelkajn fragmentojn, tamen jam mi kaj miaj kunuloj admiras ĝian enhavon. Ĉar ĝi estas tre abunda kaj profunda je la enhavo, estas

necese legi ĝin malrapide kaj primediti sur ĉiuj vortoj por gustumi adekvate la nutraĵon kiun ĝi montras al ni.

Mi ricevis regule ĝis nun dum tiu ĉi jaro *El Popola Ĉinio*. Ĝin admiras miaj kolegoj pro ĝiaj belaspektaj kovroj kaj la eksterordinaraj fotoj.

Letero de Ĉeĥoslovaka Leganto M. M.

Bonan tagon, estimataj gekamaradoj,

En ordo mi ricevis, kiel ĉiujare, belan kalendaron. Ĝi estas bele preparita kaj plaĉas al mi kaj tuta nia familio. En venonta merkredo mi portos ĝin al Esperanta klubo por propagandi la belan gazeton *El Popola Ĉinio*. Nur pere de tiu ĉi bela gazeto ni ekscios tion, kio okazas en via patrujo. En nia familia rondo nia plej aĝa filino deklamas la pensojn de la plej ruĝa suno, la gvidanto de via popolo MAŬ ZEDONG.

Mi denove abonis je la venontaj tri jaroj gazeton supre menciitan. Pro la kalendaro kaj la bildkartoj mi elkore dankas kaj deziras al ĉiuj viaj kunlaborantoj multe da sano kaj sukcesoj en via laboro.





JAPANAJ PROGRESEMAJ STUDENTOJ PERSISTAS EN SIA JUSTA Batalo

De la pasinta jaro, japanaj progresemaj studentoj ĉiam persistas en sia batalado malcedema por oponi la usonan imperiismon, la japanan reakciularon kaj ilian lakeon, la reviziisman Mijamoto-klikon de la Japana Kompartio, kaj la putran edukan sistemon.

En la pasinta jaro, la progresemaj studentoj de la Tokia Universitato persistis en strikado ĉirkaŭ 300 tagojn. En la komenco de la kuranta jaro, ili denove levis ankoraŭ pli altan tajdon en sia batalo. La progresemaj studentoj okupis la komandejon de la reacia aŭtoritatularo kaj la domegojn de la universitato kaj kritikis la reaciajn ĉefojn de la universitato kaj ĝiaj fakultatoj. Kuraĝigite de la heroa batalado de la progresemaj studentoj de la Tokia Universitato, ankaŭ la progresemaj studentoj de kelkdek aliaj japanaj universitatoj leviĝis amase por konduki senŝanceliĝan batalon kontraŭ la reakciularo de Usono kaj Japanio kaj la reviziisma Mijamoto-kliko.

Por estingi la batal-fajregon bruligitan de la studentoj de la Tokia Universitato, la uson-japana reakciularo uzis pli ol dek mil armitajn policanojn, dekojn da kiras-aŭtoj kaj helikopterojn por fari barbaran subpremon. Sed la atakoj de la armitaj policanoj estis foje kaj refoje rebatitaj de la progresemaj studentoj kaj la laboristoj kaj progresemaj studentoj el diversaj lokoj, kiuj venis por ilin subteni, per bastonoj kaj ŝtonoj kiel armiloj, sin ŝirmante per diversaj barikadoj. Dum sia manifestaciado, la japanaj progresemaj studentoj alte tenis portretojn de Prezidanto Maŭ kaj laŭte kriadis sloganojn kiaj "Frakasu la Japan-Usonan 'Sekurecan Traktaton'!" "For la reviziisman Mijamoto-klikon de la Japana Kompartio!"

Nun la japanaj progresemaj studentoj estas paŝon post paŝo sin kombinantaj kun la batalo de la labo-

ristoj kaj kampanoj por forte bati la japan-usonan reakciularon.

LA PATRIOTAJ ARMEO KAJ POPOLO DE LAOSO FALIGIS KAJ DETRUIS 1,000 USONAJN AVIADILOJN

Ekde la 17-a de majo, 1964, kiam la usona imperiismo komencis aerataki la liberigitan regionon de Laoso, ĝis la 22-a de januaro de la kuranta jaro, la patriotaj armitaj fortoj de Laoso jam faligis kaj detruis 1,000 usonajn banditajn aviadilojn.

El tiuj 1,000 usonaj aviadiloj, 238 estis faligitaj per infanteriaj armiloj kaj 40 el ili estis detruitaj surtere.

La plej alta komandejo de la Laosa Popola Liberiga Armeo emfazis en sia komunikado, ke tio ĉi estas ekstreme granda venko de la laosa popolo, la Laosa Popola Liberiga Armeo kaj la Patriotaj Neŭtralaj Fortoj de Laoso, kaj samtempe ekstreme peza bato al la usona imperiismo kaj ĝia lakeo.

LA TURKA POPOLO INDIGNE FORPELIS MILITŝIPOJN DE LA USONA IMPERIISMO

En februaro de la kuranta jaro, la turka popolo levis indignan tajdon kontraŭ la aviadila ŝipo Forrestal kaj tri destrojeroj de la usona Sesa Floto, kiuj iris al Turkio por aktivado. Frumatene de la 10-a de februaro, kiam tiuj militŝipoj enŝteliĝis en la plej grandan havenon de Turkio Istanbul, turkaj patriotaj studentoj kaj popolamasoj kontinue faris manifestaciojn, laŭte kriante sloganojn kiaj "Jankioj hejmeniru!" "Turkio volas sendependecon!" La indignaj manifestaciantaj amasoj forbruligis usonan standardon kaj figuraĵon de Robert W. Komer, la usona ambasadoro al Turkio kaj atakis la ĉefstabejon de la usonaj agresaj trupoj kaj aliajn usonajn agresajn instituciojn en la turka ĉefurbo Ankara. Ili brave luktis kontraŭ la granda nombro da soldatoj kaj policanoj alsenditaj de la reacia aŭtoritatularo de Turkio por subpremi la manifestaciantajn amasojn. Sub la forta protesto de la turka popolo, la kvar militŝipoj de la Sesa Floto de la usona imperiismo sin foriris de Istanbul je la 17-a.



**LA MOVADO DE JAPANAJ
PROGRESEMAJ STUDENTOJ
EN VIGLA DISVOLVIĜO**

Progresemaĵ studentoj de la Tokia Universitato kune kun la lernantoj kaj junaj laboristoj el diversaj lokoj de Japanio okazigis grandiozan amasan mitingon kaj forte kondamnas la reaktan Sato-registaron, la universitatan aŭtoritaton kaj la reviziisman klikon de Mijamoto pro ilia krimo de subpremo kontraŭ la studenta movado.

Sub la subteno de laboristoj kaj urbanoj la progresemaĵ studentoj de Japanio disvolvis bravan lukton kontraŭ la faŝismaj policistoj per ŝtonoj kaj bastonoj, forĵetinte la tiel nomatan "laŭleĝismon", kiun la reviziisma kliko de Mijamoto de la Japana Kompartio uzas por malhelpi la studentan movadon.





Alte tenante la ruĝan standardon kun slogano "Vivu la Penso de Maŭ Zedong!", la japanaj laboristoj starigis barikadojn ĉe strato kaj disvolvis firman batalon kontraŭ la reakciaj policistoj.

Antaŭ brava rebato de la progresemaĵ studentoj de Japanio la japanaj reakciaj policistoj morte terurigis. Ili ĉiuj kuntiras sin post ŝirmiloj, montrante la veran vizaĝon de la uson-japana reakciularo kiel papera tigro aspekte potence sed esence malforta.



*Sur la
kovrilo:*

En la tajde potenco granda proletara kultura revolucio, alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, juna teksistino Hju Hiuĝi (la meza) de la Tria Ŝtata Kotona Ŝpinteksejo en Ŝigiaĝuang brave sturmis en la batalo inter la du klasoj, inter la du vojoj kaj inter la du linioj, kun firma kaj klara starpunkto, kaj ricevis varman subtenon de la vasta amaso de revoluciaj laboristoj. Ŝi estas elektita kiel membro de la revolucia komitato de la ŝpinteksejo kaj membro de la revolucia komitato de la subprovinco.

*Sur la
dorskovrilo:*

Aspekto de la Hebej-a Nitrosterka Fabriko kun monda avangarda nivelo en la sesdekaj jaroj, kiun nia lando mem projektis kaj kies ekipaĵojn nia lando mem fabrikis kaj muntis.

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 5 (130) 1969

Ĉefa Enhavo

Tenu Revolucion, Stimulu Produktadon kaj Batalakiru Novajn Venkojn sur la Industria Fronto

Giganta Frukto de Sinapogo sur Propraj Fortoj

Sukcesa Finkonstruiĝo de Rel-traba Fabriko de Baŭtoŭ-a Ferŝtala Kompanio

Pri Prezidanto Maŭ Sopiras la Liberigitaj Servutuloj (*poemo*)

Brila Sukceso Akirita de Ĉinio en Grandskala Multampleksa Observo pri Plena Suneklipso

La Elstara Kompartiano Huang Mucaj

Juna Teksistino Hju Hiuĝi

Granda Ŝanĝiĝo de Sovaĝa Rivervalo Ebenajo

Post Kiam Malriĉkampanoj kaj Malsuperaj Mezkampanoj Ekadministris Komercon en la Kamparo

Propaganda Taĉmento de la Penso de Maŭ Zedong el Ruĝaj Maljunulinoj

Tutkore por la Kolektivo

Li Ricevis la Duan Vivon

Ruĝa Signal-lanterno (*pekinopero*)

Batalo sur Fuvan-monto

Lecionoj de Ĉina Lingvo


Nova Metiaro

Sturma Konkero de Luding-ponto

(Ebura Skulptaĵo)

Luding-ponto sin trovas super Dadu-rivero en Siĉuan-provinco kaj estas grava ponto sur la vojo de Siĉuan al Tibeto. Ĝi konsistas el 13 ferĉenegoj, kies finoj estas fiksitaj en rokoj sur ambaŭ bordoj. Sub la ponto ruliĝas torentego. Dum sia mondfama Longa Marŝo de 25,000 lioj de 1934 ĝis 1935, la Ĉina Laborista-kamparana Ruĝa Armeo disbatis la malamikan trupon ĝin gardantan kaj prenis ĝin.


Ebura skulptaĵo "Sturma Konkero de Luding-ponto" vivece prezentas al ni la heroajn figurojn de la bravaj ruĝarmeanoj, kiuj transpasis la riveron rampante sur la ferĉenegoj spite al pafado de la malamikoj ĉe la kontraŭa bordo, plene ekstermis la malamikojn kaj ŝirmis la tutan armeon sekure transmarŝi la riveron.




Nove Konstruita
Moderna Nitrosterka
Fabriko Komencis
Produktadon

Supre) Angulo de la kontrola ĉambro ekipita per aŭtomataj kontroliloj

Sube) Ekstera aspekto de la Hebeja Nitrosterka Fabriko de monda avangarda nivelo, kiun projektis kaj kies ekipaĵojn abrikis kaj instalis mem nia lando.







(Supre maldekstre) Ge-
laboristoj intersanĝas
spertojn en kreiva studo
kaj kreiva apliko de la
penso de Maŭ Zedong.

(Sube maldekstre) Ana-
lizistino zorge laboras
en la laboratorio.

(Supre dekstre) Kun gran-
da ĝojo, malriĉkampa-
ranoj kaj malsuperaj
mezkomparanoj vizitas
la nitrosterkan fabrikan.

(Sube dekstre) Granda
kvanto da kemia sterko
estas transportata al la
kamparo.



